ESPERANTA BIBLIOTEKO INTERNACIA

N-oj 29-31

J. J. Porchat

Sub la Neĝo

Trad. J. Borel

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin kaj Dresden

ESPERANTO-VERLAG
ELLERSIEK & BOREL G. M. B. H.
BERLIN KAJ DRESDEN

DU
GRAVAJ GAZETOJ

multe ŝatataj kaj tre legindaj
por ĉiu Esperantano, estas

GERMANA ESPERANTISTO

Monata gazeto por la
disvastigo de la lingvo
Esperanto, kaj

ESPERANTO-PRAKTIKO

Monata gazeto por per-
fektigo en la Lingvo
Internacia

Ĉefredaktoro por ambaŭ
FRIEDRICH ELLERSIEK
Redaktoroj: Arnold Behrendt
kaj Karl Minor

Oni postulu specimenajn numerojn, kunsendante po unu nova respond-kupono

ESPERANTA
BIBLIOTEKO INTERNACIA

N-oj 29—31

J. J. Porchat

Sub la Neĝo

Taglibro
de juna loĝanto de la Jura-montaro

Verko kronita de la Franca Akademio

Esperantigis
J. BOREL

2a eldono

Esp

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr 134651
Czytelnia Książek
w Białymstoku

929 Porchat J. J. = 922

1923
Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin kaj Dresden

Rimarko de l' tradukinto

Ofte mi aŭdis la plendon, ke ni ne havas en Esperanto sufiĉe da noveloj aŭ historioj kun enhavo serioza kaj interesa, sed tamen simpla kaj facile komprenebla por komencantoj.

Konsciante pri tiu bezono, mi deziris kunlabori por ĝin kontentigi, kaj elektis por esperantigo verketon de J. J. Porchat, kiu ravis min en miaj infanaj jaroj, kaj kiu, mi esperas, ankaŭ trovos simpatian akcepton ĉe la internacia legantaro.

Tiu ĉi kortuŝanta rakonto, kies franca originalo aperis sub la titolo „Trois mois sous la neige", estas dediĉita al la junularo kaj verkita en stilo tre simpla kaj klara. Ĝi prezentas sub formo agrabla noblajn pensojn kaj instruojn kun altmorala kaj filozofia valoro. La profunde religia sento de l' aŭtoro trapenetras la tutan verketon en diskreta, netrudema maniero.

La literaturan kaj moralan valoron de la verko de Porchat oficiale rekonis la Franca Akademio, honorante ĝin per speciala rekompenco. Ĝi poste estis enkondukata kiel legolibro en popolajn lernejojn de Francujo, kie instruistoj kaj lernantoj egale ŝatis ĝin.

Povu la internacia traduko ankaŭ utili al la ĉiam pli multnombraj esperantistoj dissemitaj en la tuta mondo; plenaĝuloj kiel infanoj eltirus el ĝi profiton.

Berlin, 1907.

J. Borel

Enkonduko

Junaj amikoj!

La rakonto, kiun ni prezentas al vi, sub titolo kiu eble mirigos vin, estas bazita sur fundo de vereco; ĝi tute ne surprizos personojn, kiuj konas la montajn landojn kaj la akcidentojn, al kiuj iliaj loĝantoj estas elmetitaj.

Ĉar ni elektis ĉi tiun historion ne nur por amuzi sed ankaŭ por instrui vin, ni mallonge priskribos la lokojn, kie la sceno okazas kaj la malfacilan kaj laborplenan vivon de la montanoj de l' Jura. La rakonto estos al vi pli komprenebla kaj pli interesa.

Jura estas montaro, konsistanta el kelkaj paralelaj ĉenoj, kiuj etendiĝas de Basel, en Svisujo, ĝis Francujo laŭlonge de la departementoj Doubs, Jura kaj Ain en la direkto de l' nordoriento al sudokcidento, kun longeco de 280 kilometroj proksimume kaj larĝeco de 60 ĝis 64 kilometroj. La Juramontaro enhavas grandan kvanton da valoj kaj posedas multajn tre altajn montpintojn inter kiuj oni distingas Reculet, kiu havas pli ol 1760 metrojn super la maro, Dôle kaj Mont-Tendre, kiuj superas 1700 metrojn.

Estas grave scii tiujn ĉi detalojn, ĉar estas ĉefe la diferenco en la alteco de l' montoj, kiu igas ilin pli aŭ malpli loĝeblaj: ju pli altaj ili estas des pli akra estas la malvarmo kaj des pli mallonga estas la somero, la kreskaĵoj estas maloftaj kaj la neĝo frutempa kaj multa.

Sed sur ĉiuj montoj de Jura la neĝo fine tute fluidiĝas dum la somero, kreskaĵoj verdiĝas eĉ sur la plej altaj suproj; en multaj lokoj ili estas kovritaj de belegaj arbaroj kun fagoj, kverkoj kaj precipe abioj dum aliaj partoj havas riĉajn paŝtejojn, kie oni paŝtas tre belajn brutarojn: bovojn, bovinojn kaj kaprinojn. Tamen ĉi tiuj belaj montoj estas loĝeblaj nur dum proksimume kvin monatoj; de la monatoj Majo-Junio ĝis la unuaj tagoj de Oktobro.

Tuj kiam la neĝo fluidiĝis kaj kiam la suproj reverdiĝis la vilaĝoj, ĉiuj konstruitaj en la valoj aŭ sur la malsupraj deklivoj, sendas siajn brutarojn sur la monton. Tiu foriro estas festa tago kaj tamen la kompatindaj paŝtistoj forlasas siajn familiojn, kaj restos solaj dum la tuta somera sezono, havante ekzistadon malfacilan kaj laborplenan. Ili nutras sin sur la monto preskaŭ ekskluzive per laktaĵoj, trinkas nur cisternan akvon kaj pasigas sian tutan tempon paŝtante la brutarojn kaj farante tiujn grandajn kaj belajn fromaĝojn malmolajn, kiuj estas disvendataj sub la nomo fromaĝoj de Gruyère (Svisa regiono).

Oni faras ilin sur la monto. Tie ĉiu paŝtisto havas dometon malriĉan, kvankam plejofte konstruitan el ŝtono. Ĝi estas kovrita per malgrandaj tabuletoj el abia ligno, pezaj ŝtonoj surmetitaj tie ĉi kaj tie premas ilin kaj malhelpas, ke la ventego ilin forblovu. La internaĵo de l' domo estas ordinare dividita en tri partoj: bone fermita bovinejo por loĝigi la brutaron vespere, mallarĝa kaj malvarmeta laktejo, kie oni metas la lakton en kuvetoj el blanka ligno, kaj kuirejo uzebla samtempe kiel dormoĉambro, kie la mizera paŝtisto plejofte havas nur pajlon por sia kuŝejo. Ĉi tiu kuirejo

havas vastan kamenon, sub kiu pendas giganta kaldrono por varmigi la lakton kaj fari el ĝi fromaĝon.

Dum la tuta daŭro de sia restado sur la monto la paŝtistoj vidas nur kelkajn fremdulojn, kiuj vizitas la landon. Ili volonte donas al la vizitantoj kremon kaj ofte ricevas interŝanĝe freŝan panon, kiu estas ŝatata frandaĵo por la montaj paŝtistoj. Tamen ili ne plendas pri sia sorto, ili ne deziras ŝanĝi sian vivmanieron; ili amas siajn dezertajn regionojn kaj restas fidelaj al la kutimoj, laboroj kaj hejmoj de siaj prapatroj.

Ilia somera monta restado finiĝas la tagon de Sankta Denizio, 9an de Oktobro. Tiam ili forlasas la montojn; tio estas festo, kiel tiu de l' montiro, sed pli dolĉa ĉar nun ili revidos sian familion. Aliaj tute malsimilaj laboroj tiam komenciĝas en la vilaĝo. Ĉi tiuj montanoj, kutimintaj zorgi mem pri ĉiuj necesaĵoj de la vivo estas tre lertaj; ili fabrikas dommastrajn kaj aliajn ilojn, meblojn, skulptas multegon da ĉarmaj lignaj objektoj, kiuj venditaj en la ĉirkaŭaĵo, poste estas disportitaj tra la tuta mondo.

Dum la longaj vintraj vesperoj la infanoj lernas kaj estas instruataj en la gepatra hejmo, ĉar la vojo al la lernejo ne estas ĉiam irebla kaj senneĝigita. Kunigitaj ĉirkaŭ siaj gepatroj, ofte la infanoj havas la deziron studadi, ili faras komunan legadon kaj instruas sin distrante la tutan familion.

Nia juna vilaĝano, ne estas senkultura spirito; li povis skribi sian historion, kaj ni preferis lasi lin paroli mem. Li diros, kiel li havis la ideon fari ĉi tiun taglibron, kaj kiel li

sukcesis efektivigi tiun ideon, kiam li, pro cirkonstancoj kiujn vi baldaŭ konos, troviĝis kaptita kun sia avo en la monta domo.

Ni esperas, junaj amikoj, ke vi neniam devos suferi tiajn dolorojn kiel li; sed dum via vivado vi ofte bezonos paciencon kaj kuraĝon. La ekzemplo de Ludoviko Lopraz konvinkos vin, ke infano, kiu konfidas al Dio sukcesas akiri rezultatojn, kiujn oni ne atendus de tia junulo; vi ekscios, ke la instruoj de la malfeliĉo ofte estas la plej utilaj por homo, kaj ke la dia boneco montriĝas tiel klare en niaj doloraj cirkonstancoj kiel en la ĝojaj.

J. J. Porchat

Sub la neĝo

Taglibro
de juna loĝanto de la Jura-montaro

22an de Novembro 18 . .

Ĉar estas la volo de Dio, ke mi estu enfermita en tiu ĉi mont-dometo kun mia avo, mi volas skribi tagon post tago tion, kio okazos al ni en tiu ĉi malliberejo. Tiamaniere, se ni devas perei tie ĉi, niaj parencoj kaj amikoj scios, kiel ni pasigis niajn lastajn tagojn, kaj se ni estos liberigitaj per la dia boneco, tiu ĉi taglibro konservos la memoron de niaj danĝeroj kaj suferoj. Mia avo volas, ke mi entreprenu tiun ĉi laboron por iom okupi la horojn, kiuj kredeble estos tre longaj por pasigi kaj tre malfacilaj por plenigi. Mi unue raportos pri tio, kio okazis hieraŭ.

Jam de kelkaj semajnoj ni atendis mian patron en la vilaĝo; la tago de Sankta Denizio estis pasinta, ĉiuj bestaroj estis revenintaj malsupren de la monto kun siaj paŝtistoj. Nur mia patro ne aperis kaj oni demandis sin ĉe ni: „Kio povas lin deteni sur la monto?“ Miaj onkloj kaj onklinoj certigis, ke ni ne bezonas timi, verŝajne restis ankoraŭ herbo por manĝi

kaj pro tio mia patro gardis la brutaron kelkajn tagojn pli longe sur la monto.

Tamen mia avo komencis maltrankviliĝi pro la malfruiĝo; li diris: „Mi mem iros por vidi tion, kio haltigas Franciskon; mi ne estos malkontenta viziti ankoraŭ unu fojon la montdometon. Kiu scias ĉu mi revidos ĝin la proksiman jaron? Ĉu vi volas veni kun mi?“ li aldonis rigardante min.

Mi ĵus volis peti la permeson akompani lin, ĉar ni ne ofte apartiĝis unu de l' alia.

Ni baldaŭ estis pretaj por foriri. Ni suprenriris malrapide kaj marŝis jen laŭlonge de mallarĝaj intermontaĵoj, jen sur la rando de teruraj profundegaĵoj. Kvaronon da mejlo antaŭ la dometo, mi alproksimiĝis pro scivolemo al profunda krutaĵo, kaj mia avo, kiu jam pli ol unu fojon diris al mi, ke tio ĉi maltrankviligas lin, rapide alpaŝis por min kapti per la mano; ŝtono ruliĝis sub lia piedo, kiu distordiĝis kaŭzante al li akran doloron; sed post kelkaj momentoj li ree povis marŝadi, kaj ni esperis, ke li baldaŭ resaniĝos. Helpata de sia ileksa bastono kaj apogante sin sur mia ŝultro, li trenis sin ĝis tie ĉi.

Mia patro tre miris vidante nin. Li estis okupata farante preparaĵojn por sia foriro, kaj se ni estus atendintaj lin pacience en la vilaĝo, unu tagon plie, li mem estus veninta por trankviligi nin.

— Estas vi, patro! li diris venante antaŭen por subteni lin. Vi kredis, ke io malfeliĉa okazis al mi?

— Jes ni venas por ekscii pri tio, kio malhelpas vin malsupreniri, dum ĉiuj najbaroj jam revenis.

— Kelkaj el niaj bovinoj estis malsanaj, sed nun ili resaniĝis. Hodiaŭ vespere, mi sendas Petron kun la resto de niaj fromaĝoj; mi mem foriros morgaŭ kun la bovinaro.

— Ĉu vi estas tre laca, Ludoviko? diris al mi mia avo.

La voĉo per kiu li faris tiun demandon montris al mi, ke li havas ian sekretan penson, kaj mi ne respondis tre klare.

— Mi opinias, aldonis mia avo, ke estus saĝe resendi la infanon kun Petro; la vento ŝanĝiĝis de duona horo kaj eble alportos al ni malbonan veteron dum la nokto.

Mia patro esprimis la saman timon kaj konsilis, ke mi iru.

— Se vi volas, diris al mi la avo, mi streĉos miajn fortojn kaj malsupreniros kun vi; kelkaj momentoj da ripozo jam sufiĉos por mi.

— Mi preferus atendi vin, mi diris al mia patro, ĉirkaŭante lin per miaj brakoj. La ripozo dum unu nokto estas tute necesa por la avo, kiu vundis sian piedon pro mia kulpo.

Tiam mi rakontis tion, kio okazis al ni proksime de la mont-domo. Oni decidis, ke ni malsupreniros kune la morgaŭan tagon, kiu estis hieraŭ.

Sur la fajro pendis bolpoto, kiun mi rigardis per okuloj en kiuj mia patro vidis signon de senpacienco. Li verŝis por ni en tervazon

maisfarunan supon, kuiritan kun lakto, kiun ni manĝis, kiel soldatoj, rekte el la vazo, sen teleroj; poste mi kuŝiĝis. Mi ekdormis, ne atentante pri la konversacio de la avo kaj patro, kiuj parolis longe duonlaŭte post la vespermanĝo.

La morgaŭan tagon mi tre miris vidante la montaron tute blanka. La neĝo faladis ankoraŭ kun ekstrema denseco, forblovita de forta vento. Mi estus ĝojinta pri tio, se mi ne estus rimarkinta la grandan embarason de miaj avo kaj patro. Mi mem fariĝis tre malkvieta, kiam mi vidis mian avon klopodi por fari kelkajn paŝojn kaj ŝovi sin kun multe da peno apogante sin sur la mebloj kaj kontraŭ la muroj. Pro la malfeliĉa okazintaĵo de la antaŭa tago lia piedo ŝveliĝis, kaj li suferis akran doloron.

— Foriru, foriru, li diris. Kunprenu tiun ĉi infanon antaŭ ol la neĝo fariĝos pli alta. Vi bone vidas, ke estas al mi neeble vin sekvi.

— Sed, ĉu vi kredas, patro, ke mi povas lasi vin sola?

— Unue zorgu pri la sendanĝereco de via filo kaj de la bovinaro; vi poste pensos pri mi. Vi revenos kun portilo por transporti min.

— Lasu min, patro, porti vin sur miaj ŝultroj, kaj ni foriru senprokraste, mi petegas.

— Amiko mia, vi ne povus, tiel peze ŝarĝita, forpreni la bovinaron kaj konduki ĉi tiun infanon.

Ni pasigis parton de la tago decidante nenion. Ni ankoraŭ esperis, ke oni venos el

la vilaĝo por helpo. Mi fine diris, ke mi estas sufiĉe granda kaj ne bezonas kondukanton, ke mi eĉ povis helpi mian patron konduki la bovinaron. Tiuj ĉi paroloj estis senutilaj; mia avo persistis en sia decido. Li ne volis meti min en danĝeron malfaciiigante la vojaĝon per sia ĉeesto.

Mia patro insistis kun tia energio, ke ĝi preskaŭ similis koleron. Mi ploris. Fine tiu ĉi diskutado ĉesis, kaj mi povas diri, ke mi kunhelpis en tio. Mi parolis:

— Lasu min ankaŭ kun la avo tie ĉi. Vi des pli frue alvenos hejmen; vi revenos kun homoj por liberigi nin; aveto havos iun por servi lin kaj resti kun li; estos por mi okazo ekkoni lian bonecon; ni gardos nin reciproke kaj la Plejpotenco gardos nin ambaŭ.

— La infano estas prava, diris mia avo; la neĝo jam estas tiel alta, kaj la ventego tiel forta, ke mi vidas pli grandan danĝeron por li se li sekvas vin ol se li restas kun mi. Jen, Francisko, prenu tiun ĉi bastonon; ĝi estas forta, ĝi estas armita per ferpinto; ĝi helpos vin malsupreniri, kiel ĝi helpis nin suprenveni. Elirigu la bovinojn el la bovinejo; lasu al ni la kaprinon kaj la restantajn provizojn. Mi pli timas por vi ol por ni.

Unu momenton mia patro restis kun mallevita kapo; li levis ĝin subite kaj rapide prenis min en siajn brakojn; mi sentis liajn larmojn flui sur miaj vangoj.

— Mi ne riproĉos vin, mia kara Ludoviko, sed vi vidas la konsekvencojn de via mal-

obeo; promesu al mi korektiĝi. Dio permesis tion, kion ni vidas, kaj mi devas konfesi, ke nek via avo nek mi antaŭvidis la ekstreman embarason en kiu ni troviĝas. Se ni estus supozintaj hieraŭ vespere, ke nia situacio estus tiel malfacila hodiaŭ, ni estus uzintaj la helpon de Petro por forporti la avon.

Kiam mi vidis mian patron tuj forirontan, mi prezentis al li beletan enpajligitan botelon, kie restis iom da vino kaj kiun mi estis kunportinta la antaŭan tagon.

— Prenu ĝin, mi diris; vi pli bezonos ĝin ol ni hodiaŭ. Vi scias, ke mia kara patrino donacis al mi tiun ĉi botelon la unuan fojon, kiam mi foriris por viziti vin sur la monto: mi ĝojas, ke ĝi utilu en cirkonstanco tiel grava por vi kaj por ni.

— Mario! ekkriis mia patro kun emocio; ŝi ripozas en paco. Kaj denove li premis min en siaj brakoj pro memoro al la patrino, kiu ne plu povis karesi min.

Ni elirigis la bovinaron, kiu ŝajnis tre mirigita trovi la teron kovrita de neĝo. Kelkaj bovinoj foriĝis kaj kuris ĉirkaŭ la farmdomo; fine ili komencis kune formarŝi. Post kelkaj paŝoj mia patro malaperis kun ili en la neĝblovadoj.

Oni jam ne vidis ilin plu, sed mia avo ŝajnis ĉiam sekvi ilin per la okuloj. Li estis apoganta sin sur la fenestro, dirante nenion, sed liaj lipoj ŝajnis elparoli kelkajn vortojn; li restadis senmove kun plektitaj manoj. Lia pia silento igis min kompreni mian devon, mi

kuniĝis kun li en spirito, kaj mi rekomendis mian patron al Dio. Tiel ni restis tre longe, kaj la vento blovis kun plia forteco; densaj nigraj nuboj ĉirkaŭis nin, kaj la nokto ekvenis preskaŭ subite. Tamen nia ligna horloĝo apenaŭ estis sonorinta la trian horon.

— Bona Dio, havu kompaton al li! parolis la avo, sed li nun de longe trapasis la arbaron, kaj jam ne estas elmetita al tiu ventego. Kion li kredeble timas pro ni!

Dum la tuta tago ni havis tiom da okupadoj, ke ni tute forgesis manĝi, kaj mi kvazaŭ mortis de malsato. En tiu momento, mi atentigis mian avon pri la blekado de la kaprino.

— Kompatinda Blankineto! diris li. Ŝi suferas pro troa lakto; ŝi vokas nin. Lumigu la lampon; ni melkos ŝin kaj vespermanĝos.

— Ni ankaŭ matenmanĝos, aveto!

Tiu ĉi parolo igis lin rideti, kaj kiel mi povis vidi per la heleco de la lampo, li ŝajnis pli trankvila kaj tio iom kuraĝigis min. Tamen la vento fortege muĝis. Ĝi enbloviĝis sub la tegmentaj tabuletoj, kiuj krake tremis kaj oni povus kredi, ke la tuta tegmento estu forblovota. Ĉiumomente mi levis la kapon.

— Ne timu, diris mia avo. Tiu ĉi domo eltenis multajn aliajn ventegojn. La lignaj tabuletoj de la tegmento estas ŝarĝitaj per pezaj ŝtonoj kaj la nekruta tegmento ne prezentas multan kontraŭstaron al la vento. Poste li faris signon, ke mi devis marŝi antaŭ li, kaj ni eniris la bovinejon.

Kiam la kaprino nin vidis, ŝi duobligis siajn blekojn; ŝi kvazaŭ rompis sian ligilon, tiom fortaj estis ŝiaj klopodoj por veni al ni. Kun kia avideco ŝi manĝis manplenon da salo, kiun mi donis al ŝi! Ŝia lango pasis kaj repasis sur mia mano por ne perdi eĉ peceton. Ŝi liveris grandan poton da lakto; mi ĝin bezonis. Mia avo diris, revenante en la kuirejon:

— Ni estu tre singardemaj ne forgesi Blankineton; ni melkos ŝin zorgeme ĉiumatene kaj vespere; nia vivo dependas de la ŝia.

Mi rediris: — Vi do kredas ke ni restos longe tie ĉi?

— Tio ne estas certa, amiko mia, sed povas esti. Oni ĉiam devas esperi la plej grandan bonon kaj antaŭzorgi, kvazaŭ la plej granda malbono devus okazi.

Post la vespermanĝo, mi iris por plenigi la manĝujon de nia nutristino, mi donis al ŝi freŝan pajlon por kuŝiĝi; mi karesis ŝin, pli amike ol kutime, mi devas konfesi; ŝi ankaŭ ŝajnis pli ĝoja vidi min. Sed nun ŝi estas tute sola en la bovinejo, kaj la kaprinoj tiel malfacile povas resti sen kompanio! Kiam ŝi vidis min reirantan en la kuirejon ŝi plende ekblekis.

Ni restis ankoraŭ kelkajn momentojn apud la fajro; sed mankas multe por ke oni estu tie ĉi tiel komforte, kiel en nia vilaĝa domo. La kamentubo estas, en sia malsupra parto, same granda kiel la ĉambro, ĝi malgrandiĝas laŭgrade ĝis la supro, sed la malfermaĵo sur la tegmento estas ankoraŭ tiel vasta, ke la en-

blovita neĝo, enpenetras kaj ekstreme ĝenas nin; ĝi faras malagrabian bruon fluidiĝante ĉe la fajro kaj de tempo al tempo ni devas skui la neĝerojn, kiuj kovras niajn vestojn.

— Vi vidas, mia infano, parolis mia avo, ke ni sukcesos trovi varmon, nur en nia lito. Ni serĉu rifuĝejon en ĝi, la neĝo ne atingos nin tie, morgaŭ ni klopodos ŝirmi nin kontraŭ ĝi apud la fajro. Ni preĝu al Dio, kaj ni konfidu al lia protekto; ĉie li ĉeestas, sur la monto kaj en la ebenaĵo; eĉ se la neĝo, kiu nin kovras estus centfoje pli dika, ni tamen restus sub liaj okuloj; li vidas niajn plektitajn manojn; li aŭdas niajn malfortajn ekĝemojn. Jes, Sinjoro, vi estas kun ni: ni ripoziĝos sentime sub la ombro de viaj flugiloj.

Mi estis kortuŝita kaj neniam mi preĝis kun pli granda konfido ol hieraŭ vespere.

Hodiaŭ matene, vekiĝante, mi troviĝis en plena mallumo kaj mi unue supozis, ke mia dormado estis pli mallonga ol kutime; tamen mi aŭdis mian avon marŝadi palpirante tra la kuirejo, mi frotis miajn okulojn sed ne vidis pli hele.

— Aveto, mi diris, vi ja leviĝas antaŭtage!

— Infano, li respondis, se ni atendus ĝis la tago lumigos nin, ni restus longe en lito. Mi kredas, ke la neĝo staras pli alte ol la fenestro.

Aŭdante tion, mi ekkriis de teruro, kaj saltante el la lito, mi tuj lumigis nian lampon kaj ni povis certiĝi, ke la malĝoja supozo de mia avo estis prava.

— Sed la fenestro estas malalta, aldiris li; cetere estas verŝajne, ke la neĝo amasiĝis en tiu loko; eble ĝi ne estas alta du futojn kelkajn paŝojn for de la muro.

— Tiam, oni venos por nin liberigi?

— Mi esperas; sed, post Dio, ni unue konfidu al ni mem. Supozante, ke li volos deteni nin enfermitajn kelkan tempon tie ĉi, ni vidu kiaj estas niaj provizaĵoj, kaj kiam ni konos ilin, ni reguligos la uzadon, kiun ni devas fari el ili. La tago jam venis, tio estas senduba. La horloĝo montras la sepan horon; feliĉe mi ne forgesis ĝin streĉi hieraŭ vespere. Tion ni devas atente prizorgi; estas necese kaj agrable scii la horon kaj ni devas esti tre akurataj pri Blankineto.

Tiamaniere ni komencis tiun ĉi tagon, sed ĝi estis malĝoja kaj laciganta: mi ne povas plu teni mian plumon; aveto opinias, ke mi devas prokrasti ĝis morgaŭ la daŭrigon de mia rakonto.

22an de Novembro.

Se estas ĉiam same, mi havos multe da peno por skribi ĉiun vesperon la historion de la tago. Kiam mi estis en la lernejo, oni ofte laŭdis min pro mia facileco por fari la malgrandajn kompoziciojn altruditajn, kiel ekzercojn, al la plej lertaj lernantoj; sed mi estus tre malproksime esti kapabla ĉion diri kaj precipe skribi, kion mi pensas kaj sentas. Mi faros plej bone mian eblon. Se tiuj ĉi paĝoj estos

iam legataj de kelkaj fremduloj, ili ne forgesos, ke oni trovis ilin en monta dometo, kaj ke ili estis skribitaj de lernanto.

Hieraŭ matene, kiam ni vidis, ke ni estis ankoraŭ pli profunde malliberigitaj sub la neĝo, ni tre malĝojiĝis; tamen ni pensis pri la matenmanĝo kaj pri la kaprino. Dum mia avo estis okupata ĝin melki, mi rigardis lin kun granda atento.

— Vi estas prava, li diris; vi devas lerni min anstataŭi. Vi vidas, ke mi havas iom da peno kliniĝi por atingi la mamon de Blankineto. Alproksimiĝu kaj klopodu mem ŝin melki.

Post momento, mi sukcesis ŝprucigi kelkajn gutojn da lakto; sed ŝajnas ke mi vundis nian nutristinon, ĉar ŝi ribelis, kaj ŝi preskaŭ renversis la laktokuveton; de tiam, nome hieraŭ vespere kaj hodiaŭ matene, mi ekprovis du fojojn plie, kaj mi pli bone sukcesis.

Post la matenmanĝo ni faris esploron en la domo por trovi ĉion, kio povas utili por nia uzado. Mi donos la detalon alian tagon; mi havas ankoraŭ tiom por diri, ke mi timas resti en la vojiro kiel hieraŭ.

Kiam ni estis rekonintaj la disponeblan kvanton da nutraĵo kaj ilaro, ni deziris ekscii, kia vetero estas. Mi metis min sub la kamentubo, kaj mi rigardis tra la sola malfermaĵo, kiu restis libera en la domo. Post kelkaj momentoj la suno ekbrilis sur la neĝo, kiu ĉirkaŭis la malfermaĵon formante densan tavolon. Mi rimarkigis ĝin al mia avo.

Oni distingis sufiĉe bone la dikecon de la neĝa tavolo, ĉar la malfermaĵo ne elstaras pli alte ol la tegmenta supraĵo, ĝi estas nura truo.

— Se ni havus ŝtupetaron, diris mia avo, vi suprenirus tien, kaj vi elfosus el la neĝo lignan kamenfermilon, kiun via patro metis tien por ŝirmi sin kontraŭ la pluvo kaj la malvarmo, atendante, ke oni riparu la kamenon, difektitan de ventego.

— Se la kameno estus malpli larĝa, mi respondis, mi ne bezonus ŝtupetaron, mi provus suprenrampi kiel la kamentubistoj.

Ni restis pensante kelkajn momentojn; sed la avo rememoris, ke li estis vidinta en la bovinejo longan lignan stangon. Mi ekfrapis la manojn de ĝojo.

— Jen estas tio, kion mi bezonas, diris mi; ofte mi grimpis sur arbojn kies trunkoj ne estis pli dikaj. La stango havas ankoraŭ ŝelon, estas plia faciligo.

Sed oni devis enkonduki ĝin en la kamenon; tio povis esti malfacila. Feliĉe la kamena truo estas tre larĝa kaj alta, kaj ni fine sukcesis dankon ankaŭ al la fleksebleco de la ligno.

Poste mi entreprenis la laboron; mi ligis ĉirkaŭ mi ŝnureton por supren tiri ŝovelilon, kiam mi estos sur la tegmento. Mi tiel helpis min per la piedoj kaj la manoj apogante min ankaŭ kontraŭ la flankoj de la kameno, ke mi alvenis sur la tegmenton. Komence mi faris

por mi lokon, forigante la neĝon per helpo de la ŝovelilo, kaj mi vidis, ke ĝi estas dika proksimume tri futojn; ĉirkaŭ la domo ŝajnis al mi, ke estis ankoraŭ multe pli da neĝo. Estis efektive la vento, kiu amasigis ĝin; mirinde kiel grandega kvanto da neĝo estis falinta dum tiel mallonga tempo!

La tuta spaco, kiun oni vidas ĉirkaŭ la dometo estas nur blanka tapiŝo; la arbaro, kiu haltigas la vidadon flanke de la valo estas blanka kiel ĉio alia, escepte de la arbaj trunkoj kiuj aspektas tute nigraj. Kelkaj arboj rompiĝis sub la ŝarĝo, mi vidis dikajn branĉojn kaj eĉ trunketojn rompitajn en pecoj.

En tiu momento blovadis forta kaj malvarmega nordvento; la malhelaj nuboj, kiujn ĝi puŝadis antaŭ si disiĝis intermite, permesante al la suno ekbrili, kaj tiu ĉi blindiga heleco kuradis sur la neĝa kampo rapide kvazaŭ sago.

La malvarmeco kaptis min. Kiam mi volis klarigi al la avo, kion mi vidas, li aŭdis, ke miaj dentoj interfrapadis; li diris al mi ke mi rapidu por senneĝigi la kamenfermilon kaj kiel eble plej multe la tutan ĉirkaŭaĵon de la kamentruo. Tiu ĉi laboro kostis al mi multe da tempo kaj da peno sed varmigis min. Kiam ĝi estis finita, laŭ la klarigoj de mia avo, mi remetis la ŝnuron en rulblokon, tiamaniere, ke tirante oni malfermu la kovrilon kaj ke ĝi refermiĝu per sia propra pezo kiam oni malstreĉas la ŝnuron. Post kiam ni certiĝis per kelkfoja provado, ke la sistemo funkciadas

bone, mi malsupreniris pli facile ol mi estis supren-rampinta.

Miaj vestoj estis tute malsekaj, kaj mi ne havis aliajn. Ni ekbruligis helan fajron per branĉetoj kaj abiaj fruktoj, poste mallevante la fermilon kaj lasante nur la necesan spacon por ke la fumo povu eliĝi, ni tiel pasigis la plej grandan parton de la tago apud la fajro sen alia lumo ol tiu de la fajrejo, ĉar nia provizo de oleo estas tre malgranda kaj ni vidas, ke ni ne povas esperi baldaŭ forlasi nian malliberejon. Ni eklumigis la lampon nur por melki la bovinon.

Estas por ni tute nekonata kaj malĝoja afero tiel konsumiĝi tutan tagon. Mi tamen kredas, ke la horoj ŝajnus al mi malpli longaj, se mi ne estus konstante atendanta. Mi ĉiam esperas, ke oni baldaŭ venos por nin liberigi. Mi reiris sur la tegmenton por vidi ĉu neniu alvenas; mi ne ĉesis demandadi aveton. Li esperas, diras li, ke mia patro alvenis sane hejmen, sed eble la vojoj estas nun obstrukciitaj per la amasoj da neĝo.

Ferminte tute la malfermaĵon de la kameno ni fine iris en liton hieraŭ vespere kun la espero, ke oni venos hodiaŭ por savi nin; sed hodiaŭ matene ni rekonis, ke la afero estas nun preskaŭ neebla. Ŝajnas, ke ne ĉesis neĝadi la tutan nokton. Ni havis plej grandan penon por malfermi la kamenkovrilon, fine mi sukcesis kaj ni povis ekbruligi fajron. Mi trovis du futojn da freŝa neĝo. Aveto ne volas plu, ke mi esperu forlasi tiun ĉi tombon

antaŭ la printempo. Tiu ĉi mallibereco ne estas tio, kio plej multe malĝojigas min: la danĝeroj al kiuj mia patro estis elmetita, kaj se li estas savita, liaj timoj pri mi turmentis min multe pli.

Tiun ĉi printempon, mi venis pasigi kelkajn tagojn kun li sur la monton kaj mi kunportis inkon, plumojn kaj paperon, ĉar li ne volas, ke mi tute ĉesu studi kaj skribi, kiam mi ne iras en la lernejon. Forlasante lin mi volis forporti tion, kio restis de tiu ĉi skribilaro sed li diris:

— Lasu ĉion ĉi en la ŝranko; vi ĝin retrovos la proksiman jaron. Jen estas la papero kaj la plumoj, kiujn mi hodiaŭ uzas sed tute alie ol mi pensis.

24an de Novembro.

Mi ankoraŭ tremas de teruro, kiam mi pensas pri la malfeliĉo kiu povis okazi! Kiel oni imagos, ke enterigitaj sub la neĝo, ni preskaŭ pereis per fajro? Jen nova danĝero, kontraŭ kiu ni devos esti tre singardemaj. Ni sidis antaŭ nia fajro, kaj por pasigi la tempon, mia avo igis min iom kalkuli, mi estis surŝutinta la fajrejon per cindro, kiel oni faras per sablo en kelkaj lernejoj por skribi ciferojn sur ĝin; dum mi finis mian kalkuleton, lumigita de la fajro, ni eksentis varmon malantaŭe; ĝi devenis de pajla garbo, kiun ni volis uzi por diversaj laboroj, kaj kiun mi metis tro proksime de la fajrejo. Ĝi jam komencis bruli

ĉe unu fino. Mi volis ĵeti min sur ĝin por estingi la fajron, mi nur sukcesis bruli miajn manojn. Malgraŭ la peno, kiun li ĉiam havas por leviĝi, mia avo kuris al la garbo kaj senŝanceliĝe portis ĝin, tute flamiĝintan sub la kamenon.

— Forigu, li kriis, ĉion kio povus ekbruli!

— Mi forŝovis niajn seĝojn, la provizon da ligno kaj ĉion, kio estis proksime de la fajrejo. Tiam ni pasigis teruran momenton. La flamo konstante pligrandiĝis; ni tenis la garbon starantan kontraŭ la muro kun helpo de fera forkego kaj de fajro-ŝovelilo. Ne eĉ guto da akvo restis provize! La tuta dometo estis lumigita de flavruĝa flamo; la fumo ne povis eliri kaj sufokigis nin. Tamen se ni lasus fali la garbon, la fajro tuj etendiĝus ĉien kaj ni estus perditaj. Flamigitaj pajleroj flugetis ĉirkaŭe, ili povus fali sur la liton, en la angulon de la ĉambro, aŭ ekbruligi la trabojn super niaj kapoj aŭ la tabularon, kiu apartigis nin de la bovinejo.... Ŝajnas, ke pajla garbo estas baldaŭ konsumita, tamen mi kredis, ke mi neniam vidos la finon de ĝia brulado. Fine ĝi komencis malgrandiĝi.

— Tuj piedpremu, diris la avo, ĉion kio ankoraŭ brulas, estingu la plej malgrandajn fajrerojn.

Li mem faris tiel. Post momento ni retroviĝis en profunda mallumo, sed ni ne ĉesis timi, antaŭ ol ni certiĝis, ke nenio ekbruliĝis ĉirkaŭ ni. Iom post iom la fumo ankaŭ maldensiĝis; ni lumigis la lampon kaj

vidis nin nigraj kvazaŭ karbistoj; sed dank' al Dio ni estis savitaj kun nia dometo, sen alia difekto ol kelkaj negravaj brulvundetoj sur la manoj kaj piedoj.

Ni skuis la cindron kaj polvon, kiuj kovris nin, kaj mia avo kulpigante sin pro malzorgemo, diris:

— Oni ne povas tro frue korekti siajn erarojn. Se ni estus havinta pretan sitelon da akvo, ni estus evitinta tiun danĝeron; ni havas en la laktejo malplenan barelon, ni devas ĝin malfermi ĉe unu fino kaj starigi ĝin apud la fajrejo. Ni ĝin plenigos per neĝo, kiu baldaŭ fluidiĝos kaj ni havos provizon da akvo en okazo de danĝero. Sed precipe ni estu pli zorgemaj kaj pli atentaj. Mi ne bezonas diri al vi, ke la brulado de la domo estus nia morto; ni havas nenian rimedon por savi nin; tia malfeliĉo estas same timinda por ni kiel por maristoj sur la oceano.

Ni do senprokraste komencis agi. Ni malfermis la pordon de l' dometo kaj ni plenigis la barelon, stariginte ĝin en konvenan lokon. Neĝo ne mankos por tiu celo! Mia koro premiĝis, kiam, malfermante la pordon, mi ekvidis antaŭ ni tiun ĉi blankan muron, kiu apartigas nin de la tuta mondo.

25an de Novembro.

La neĝo daŭradas fali densege. Denove mi havis multe da peno por forŝovi ĝin de la kamen-kovrilo, kiu estis ŝarĝita. Ni opiniis,

ke estas prudente senŝarĝigi la tegmenton de parto de l' pezo, kiun ĝi portas. Mi okupis min hodiaŭ longe prì tio. Mi lasas sub miaj piedoj sufiĉe dikan tavolon de neĝo por ŝirmi nin kontraŭ la malvarmo kaj mi forĵetas la reston.

Estas distraĵo por mi esti iom for de mia karcero, kaj tamen tio, kion mi vidas estas tre malĝoja. Oni preskaŭ jam ne distingas ĉirkaŭ la domo la malegalecojn de la tero; la cisterno, kiun mi ankoraŭ hieraŭ vidis, tute malaperis; oni ne povas imagi ion pli malĝojan ol tiun pejzaĝon; la tero estas blanka, la ĉielo nigra. Mi legis en la lernejo rakontojn pri vojaĝoj en la glacia Oceano kaj al la polusaj regionoj, nu, ŝajnas al mi, ke ni estas transportitaj tien. Sed, ĉar malfeliĉaj vojaĝantoj, kiuj tiel suferis de malvarmo kaj kuris*) tiel grandajn danĝerojn, revenis en sian patrujon, mi ankaŭ esperas, ke ni revidos mian patron kaj la vilaĝon.

Ni ne estas senigitaj de ĉio en nia soleca loĝejo. Ni trovis pli da fojno kaj da pajlo ol estus necese por nutri kaj kuŝigi Blankineton dum unu tuta jaro. Se ŝi ne ĉesas doni lakton, ni havos tie valoregan helpon. Sed malfeliĉa okazo povas senigi nin de ĝi, kaj ni tre ĝojis trovi en angulo de la bovinejo, malgrandan provizon da terpomoj, kiun ni uzos ŝpareme. Ni antaŭ ĉio kovris ilin per pajlo por ŝirmi ilin kontraŭ la frosto. Ankaŭ en la bovinejo mia patro havis sian lignon, sed tio, kio restas

*) Internacia idiotismo.

estus nesufiĉa por varmigi nin dum longa vintro; estas do tre feliĉe, ke ni povas fermi la kamenon en la momentoj, kiam ni ne urĝe bezonas fajron; kiam oni troviĝas en danĝero suferi pro manko de brulmaterialo, oni devas esti kapabla forigi la malvarmon. Feliĉe la neĝo, kiu nin malliberigas, ŝirmas nin samtempe. Mi miras, ke ni tiel malmulte sentas la malvarmon, kvankam ni estas superŝutitaj de neĝo. — Pro tio, diras mia avo, la tritiko konserviĝas tiel bone sub la neĝo.

Ni faros same; ni restos kaŝitaj la tutan vintron kaj, ĉe la printempo ni metos la kapon el la fenestro. Sed ĝis tiam ni multe suferos de enuo kaj Dio volu, ke nia malfeliĉo limiĝu al tio!

Por ŝpari la lignon, ni havas amason da abifruktoj, kiujn mi mem parte rikoltis por bruligi en la vilaĝo. Nur hazarde oni ilin ne forportis. Fine se ni estas devigitaj ni ne ŝanceliĝos bruligi la manĝujojn de la bovinejo. Kiam temas pri savo de sia vivo, oni ne longe pripensas; ni faros kiel la maristoj, kiuj ĵetas siajn komercaĵojn en la maron.

Oni jam estis senmebliginta grandparte la domon. Tio, kion ni plej malmulte bedaŭras estas la granda kaldronego por fari la fromaĝon. Oni lasis al ni kelkajn plej necesajn kuirilojn, kaj plie hakilon, sed tute malakran, kaj segilon, kiu nemulte tranĉas. Ni ambaŭ havis poŝtranĉilon. Kvankam mankas multaj pecoj en nia meblaro, ni tamen scios vivi tiel. Pli grandan bedaŭron ni havas pro la nutraĵoj;

la niaj estas tre modestaj. Kia domaĝo, ke ni trovis nur tri panojn, tiujn panojn konserveblajn dum tuta jaro sur la monto, kaj kiujn oni fine rompas per hakilo.

Ili estis en malnova ŝranko el kverka ligno, kiun mia patro kondukis ĉi tien, antaŭ kelkaj jaroj, ĉar ĝi estis tro vasta por la vilaĝa domo; en ĝi ni ankaŭ trovis salon, iom da kafpulvoro, iom da oleo kaj malgrandan provizon da porkograso.

— Jen io, kio venas ĝustatempe, mi diris trovante ĝin.

— Tre bone, diris avo, sed ni ne uzos ĝin por nia kuirado, mi opinias. Ĝi estos anstataŭo por la lampoleo, de kiu ni havas tre malmulte. Ĉu vi ne preferas havi pli da lumo kaj iom malpli da manĝaĵo?

— Jes, sendube! mi respondis. Kiel ni sen tio eltenus mallumon daŭrantan la tutan tagon?

Ni havas nur unu liton, sed ni dormas en ĝi komforte; ĝi estas, laŭ la kutimo de niaj montoj, sufiĉe granda por enteni kvin aŭ ses personojn. Ĝi staras en angulo de nia sola ĉambro, kiu estas samtempe la doma kuirejo kaj la fabrikejo de fromaĝoj. Unu sola litkovrilo estis lasita al ni; se ĝi ne sufiĉos, ni havas pajlon kaj fojnon. Nenian littukon, nenian matracon ni havas, sed simplan sakon kun pajlo. Multe mi dezirus oportunan kuŝejon por aveto, bona lito forgesigas al maljunulo multajn mankojn. Mi, kiu povus dormi sur la

nuda tero kaj kiu ofte pasigis la nokton en la fojnejo, mi havas nenion por bedaŭri tie ĉi.

— Mi nur volus havi, mi diris, dum tri aŭ kvar monatoj la kapablecon de la marmotoj kaj ekdormi ĝis la reveno de l' printempo.

Rilate al tio mia avo rimarkigis al mi mian sendankecon kaj mian frenezecon. Li parolis: — Ni lasu al sensaĝa besto tiun longan dormadon, nia sorto estas pli bela. Dio, verdire, trudas al ni suferon, sed li bonvolas sin malkaŝi al ni. Belega rekompenco! Akceptu ĝin, filo mia, kun dankeco, kaj plenumu la devojn, al kiuj ĝi devigas vin!

26an de Novembro.

Mi ankaŭ povus meti en mian inventarion multajn objektojn utiligotajn, sed mi ne parolos pri ili ĉar mi tuj volas raporti pri trovo, kiun mi faris, kaj kiu estis por la du malliberuloj kaŭzo de granda ĝojo.

Esplorante la staton de nia meblaro kaj de niaj provizoj, mi serĉis en la plej malgrandaj anguloj, ĉu mi eble ne trovus kelkajn librojn. Mi sciis, ke mia patro neniam supreniris al la montdomo ne kunportante diversajn piecajn verkojn por fari kun siaj servistoj kelkajn legadojn, anstataŭ la diservo, kiun ili ne povas ĉeesti pro la malproksimeco; sed kredeble li jam resendis en la vilaĝon sian malgrandan libraron.

Ni tre vive bedaŭris, en nia izoliteco, ne posedi tiun rimedon por subteni kaj konsoli nin

dum nia longa restado en mallumo. Hodiaŭ, ekvidante malantaŭ la ŝranko tabulon, kiun oni tien metis, mi volis ĝin fortiri, opiniante ke ĝi povus utili por io ajn, kaj samtempe mi faligis libron tute kovritan de polvo kaj sendube forgesitan tie jam de jaroj. Estis la „Imitado de Jesuo Kristo". Rekonante tiun ĉi verkon mia avo ekkriis:

— Estas la plej bona el la amikoj, kiu vizitas nin en nia soleco! Mia infano, la „Imitado" estas libro farita por la malfeliĉuloj, aŭ plivere libro, kiu pruvas plej kortuŝante, ke estas nur unu malfeliĉo: forgesi Dion, kaj unu sola vera feliĉo: ami lin. Vi vidas, kara Ludoviko, se ni estas forigitaj de l' mondo, ni ne estas forlasitaj; ni jam trovis tion, kio subtenas la korpan vivon, ni nun posedas la nutraĵon de l' animo; nenio mankas al ni se ni scias uzi ĝin bone.

„Sed rimarku, infano mia, per kia sekvo da cirkonstancoj ni estas kondukitaj, unue al sentado de urĝa bezono de la dia helpo, due al la trovo de tiu ĉi helpo, kiu fariĝis tiel necesa! Via patro malfruiĝas kelkajn tagojn sur la monto, ni malkvietiĝas kaj volas koni la motivon. Se ni estus atendintaj lin unu tagon plie, ni estus vidintaj lin hejme; ni foriras. Vi scias kia malfeliĉo okazas al mi sur la vojo, kiu igas la revenon neebla la morgaŭan tagon; la neĝo amasiĝas kaj ni estas kaptitaj. Jen la loko, kien la Sinjoro volis konduki nin por alproksimigi nin al li. Serĉinte vane, tion kio tiel mankis al ni, nome libron

kapablan progresigi nian piecon, vi fine tute hazarde trovas, tion kion ni ne plu esperis trovi. Jen ekzemplo, inter miloj, de tio, kion oni nomas prave la vojoj de la dia antaŭvideco. Ĝi efektive aranĝis la aferojn de l' mondo tiamaniere, ke unu naskiĝu de la alia, kaj ke ni estu vizitataj, ĉu de l' ĝojo ĉu de l' doloro kaj ĉiam elprovitaj; ĉar en tiuj malkvietecoj de la vivo, en tiu sinsekvado de feliĉaj kaj malfeliĉaj cirkonstancoj, la karaktero formiĝas; ni povas akiri la virtojn de kristano."

Mi respondis:

— Mi ne bezonas, mia avo, diri al vi ĝis kia grado mi estas kortuŝita de viaj paroloj, vi ja vidas. De kiam ni estas ĉi tie ĉio, kion vi diras al mi pri miaj devoj al Dio frapas min en tute nova maniero. Ĝis nun mi preĝis por sekvi viajn konsilojn, mi obeis por plaĉi al vi; hodiaŭ mi trovas en mi novan senton; mi verece amas la Sinjoron. Sed ĉar estas afero al kiu mi ne ankoraŭ kutimis kaj ankaŭ sendube ĉar la ideo pri Dio estas granda kaj timiga, mia amo al li estas miksita de profunda timo, kiu min konfuzigas, sed kiun mi tamen ĝoje eksentas.

Tiel parolinte ni kisis nin reciproke kaj poste longe silentis. Mi neniam sentis ĝojon pli dolĉan kaj pli fortan. Mi tiam spertis, ke Dio povas ŝanĝi la malbonon en bonon; oni fariĝas feliĉa pro la malfeliĉeco mem kaj oni benas tiun, kiu sendas la punon.

27an de Novembro.

Ĉiam neĝo! Malofte en tiu ĉi sezono falas tiel granda kvanto, eĉ sur la montoj. Malgraŭ tio mi ne ĉesadis miri, ke mia patro ne venis por liberigi nin, kaj mi ĉiam eldiris mian surprizon pri tio. Ĝis nun mia avo ne volis vidigi sian maltrankvilecon; nia hodiaŭa konversacio pruvis al mi, ke li ne malpli timas ol mi.

— Tiu ĉi neĝo, diris mi, ne alvenis subite; la unuan, la duan aŭ eĉ la trian tagon oni kredeble estus povinta trafosi vojon ĝis tie ĉi.

— Mi estas tute certa, diris avo, ke Francisko faris ĉion, kion li povis; sed eble li ne sukcesis konvinki niajn amikojn kaj najbarojn, kaj li ne povis liberigi nin sola.

— Vi kredas, ke kvankam oni povus savi nin, oni lasos nin eĉ sciante ke oni eble trovos nin mortintajn post la vintro? Ĉu niaj najbaroj havus malpli da humaneco ol tiuj homoj, pri kiuj oni kelkafoje parolas en la ĵurnalo kaj kiuj entreprenas la plej malfacilajn laborojn, elmetante sian vivon por savi malfeliĉulojn enfositajn en minejo, en puto aŭ sub la ruinoj de subtera galerio?

— Mi rekonas, ke nia situacio estas tre malĝoja, mia kara Ludoviko; sed oni scias, ke ni havas loĝejon kaj kelkajn provizojn.

— Sed oni ankaŭ scias, ke tio povas manki; ke vi estas maljuna kaj kripla, kaj ke mi ankoraŭ ne havas virajn fortojn; oni devas havi kompaton al ni.

— Oni verŝajne faris kelkajn provojn kaj trovis la plenumon tro malfacila.

— Tamen kiam oni devas malfermi la grandan ŝoseon obstrukciitan de neĝo kaj fari laŭ la tuta longeco larĝan vojon por la veturiloj, oni sukcesas, kaj tio okazas preskaŭ ĉiujn vintrojn.

— Sed estas la registaro, kiu ordonas tiujn laborojn por la publika uzado kaj ili kostas multe da mono.

— Kio do? Tion, kion oni faras por la oportuneco de la vojaĝantoj, ĉu oni ne farus ĝin por savi du malfeliĉulojn, kies vivo estas en danĝero? Mi tion trovas tre kruela.

— La registaro certe ignoras, ke ni estas tie ĉi.

— Mia patro sendube faris bruon, kaj vokis ĉiujn homojn por helpo.

Jen kiel ni interparoladis, kaj ĉar la avo eksilentis, mi aldonis, kaptante liajn manojn:

— Nenion kaŝu al mi, mi petas vin. Vi estas same malkvieta kiel mi, ĉu ne vere? Parolu malkaŝe! Ĉar mi nun scias submetiĝi al la volo de Dio, mi ne plu estas malinda de via konfido; konatigu al mi viajn supozojn kaj ne lasu min sola kun la miaj. Mi preferas ekvidi pli klare mian malfeliĉon kaj scii pri ĝi ĉion, kion vi pensas.

— Nu, kara Ludoviko, mi konfesas ĝin, mi timas ke ia malfeliĉo okazis al via patro. Mi estas devigita ĝin diri, cetere vi jam divenis mian penson. Malgraŭ tio, mi estas

en granda embaraso; ĉar se li mem ne povis, aliaj personoj devis pensi pri ni.

Tiam mi komencis plori, ploregi. Aveto lasis min kelkajn momentojn profundiĝintan en mian doloron. Ni sidis apud la fajro, kiu estingiĝis. Ni tiel restis malfrue en la mallumo, mia avo tenis mian manon en la siaj, kaj premis ĝin de tempo al tempo.

— Mi diris al vi miajn timojn, li fine aldonis, ĉu vi ne volas ke mi ankaŭ diru miajn esperojn? Ni ne povas ĉion imagi. La povo de la Sinjoro superas ĉiun komprenon. Ne lasu vin senkuraĝigi kaj konservu vin por via patro kaj via avo.

28an de Novembro.

Ni kalkulis kiel eble plej ekzakte, kiom da oleo aŭ da graso konsumas nia lampo en unu tago, kaj ni konstatis, se ni lasus ĝin bruli dekdu horojn ĉiutage, ke niaj provizoj estus elĉerpitaj post unu monato. Ni do decidis kontentigi nin kun trihora lumigado. La lumeco de la fajrejo kelkafoje anstataŭos la lampon, sed ni devos ĝui tiun plezuron kun ŝparemo kaj estas domaĝe, ĉar la abia ligno faras brilan fajron, kies krakadeton kaj brilecon mi tre amas. Dum la lampo ne lumas ni babilas. Mia avo havas ĉiam ion interesan por diri al mi kaj, se nia kaptiteco daŭras longe, mi eliros multe pli instruita ol mi estis. De kelkaj jaroj li jam ne povas labori; li pasigis tiun tempon legante bonajn

librojn prunte-donitajn al li de riĉa najbaro; hodiaŭ mi profitas de liaj legadoj. Li ankaŭ faras al mi kelkajn lecionojn. Unu el tiuj, kiuj plej bone mallongigas la tagon estas la ekzercadoj de senskriba kalkulado. Li proponas al mi malgrandajn problemojn, kaj ni ambaŭ vetkalkulas por ilin solvi. Kiam unu estas preta doni la solvon, li avertas la alian, kaj ni havas reciprokan kontrolon. Tiamaniere unu horo aŭ du baldaŭ pasas. La vetfervoro vekiĝas. Komence, mia avo, pli rapide solvis la problemojn ol mi, sed por ne senkuraĝigi min, li lasis min kredi, ke li ankoraŭ serĉas la solvon, dum li jam trovis ĝin. Post kelkaj eksperimentoj mia atento plifortiĝis kaj li certigas, ke estas nenio kompare kun tio kion mi ankoraŭ povas atingi.

29an de Novembro.

Mi nun skribas daton, kiun mi ne povos forgesi: la 29an de Novembro, mi perdis mian patrinon; estis antaŭ kvar jaroj. Pasintan jaron, tiu ĉi tago estis dimanĉo. Elirinte el la preĝejo, mi iris kun mia patro en la tombejon kaj ni haltis kelkajn momentojn antaŭ la tombo, kie kuŝas la restoj de nia plej bona amikino. La herbo ne estis ankoraŭ velkigita de l' frosto, kelkaj lekantoj refloradis, kiel ofte okazas. Ŝajnas al mi, ke mi ankoraŭ vidas ilin balanciĝantajn sub la venta blovo, kvazaŭ ili volus saluti kaj danki nin pro nia vizito. Ni longe restis dirante nenion, almenaŭ per

la lipoj, ĉar niaj manoj, kiuj sin premadis pli multe esprimis ol ĉiuj paroloj estus povintaj diri.

Mi ne sufiĉe longe vivis kun mia patrino por ekkoni ĉiujn ŝiajn virtojn; sed la rememoroj, kiujn ŝi lasis en nia hejmo montras al mi ĉiutage pli klare la grandecon de mia perdo. De kiam mia patrino mortis mi ne kredas, ke mia patro pasigis unu solan tagon neparolante pri ŝi. Kelkafoje li rigardas min kaj ektrovas similecon sur mia vizaĝo, aŭ kiam mi parolas, anstataŭ respondi li diras: „Estas al mi kvazaŭ mi aŭdus ŝin."

Nun mia avo, kiu vidas min forigitan de ili ambaŭ, havas la bonecon ilin rememorigi senĉese en niaj interparoloj. Li rakontas al mi tion, kio okazis ĉe ni antaŭ mia naskiĝo kaj poste, antaŭ ol mi povis koni min mem kaj koni miajn gepatrojn. Ho, kiam li pritraktas tiun temon mi ne bezonas aliajn distraĵojn; ni povas estingi la lampon kaj atendi sen malpacienco la horon de la ripozo. Ĉio, kion li diras, aferojn pri kiuj li eble ne estus pensinta sen nia akcidento, engravuriĝas por ĉiam en mia memoro.

Mi do longe, ne sciante kaj ne pensante pri tio, ĝojigis miajn gepatrojn. Mi faris al ili karesojn, kiujn mi jam ne memoras; mi diris al ili — mi nun ne scias kiam nek pro kio — infanajn parolojn pri kiuj ili havis grandan plezuron. Jen estis la tuta rekompenco por iliaj zorgoj kaj flegoj! Koncerne tion, mia avo diris al mi:

— Kiel oni ne admirus la prudenton kaj bonecon de la Antaŭvideco? Ĝi igas la infanon aminda, eĉ antaŭ ol li scias ami, tiamaniere ke oni pli vive timas ĉiujn danĝerojn por estaĵo, kiu nenion timas, kaj oni interesiĝas pri ĝi tiom pli, ke al li estas tute neeble, zorgi por si mem.

Kiam mi penadas veki miajn plej malnovajn rememorojn, mi vidas aveton apud la fajro, mian patrinon en la ĝardeno, mian patron enirantan en la domon kun branĉfasko sur la ŝultro. Iom post iom, tiuj bildoj fariĝas pli multnombraj kaj pli malkonfuzaj, kaj mi ne povas deteni min kompari tiujn unuajn tempojn de mia vivo kun la naskiĝo de l' tago; komence oni ne distingas eĉ la plej grandajn objektojn; iom post iom ĉio fariĝas pli neta, pli hela, kaj niaj okuloj ekvidas la plej malgravajn detalojn.

30an de Novembro.

Ni trovis okupadon por niaj manoj dum parto de l' tago, sen bezono bruli pli da oleo ol la prudenteco permesas; la lumeco de la fajrejo sufiĉas. Ĉar ni havas sufiĉege da garboj, ni plektas, aŭ pli vere mi plektas la pajlon por fari longajn ŝnurojn utiligeblajn por diversaj celoj. Mia patro ĉirkaŭas per tiaj ligiloj la bedojn de pizoj, en la legoma ĝardeno, por ilin subteni; oni eĉ povas streĉi ilin ĉirkaŭ la grenkampoj precipe ĉirkaŭ la sekalo, kiu tiel ofte kuŝiĝas. Ni ankaŭ faros el ili seĝojn,

kiam ni havos la necesan lignon por ilin fabriki.

Mi sidas tute proksime de la fajro kaj mi aranĝas min tiel, ke mi laboru en la malvasta spaco, kiun ĝi lumigas; mia avo sekvas la laboron per la okuloj, kaj pasigas al mi la pajlon kiun mi bezonas. Precipe li zorgas, por ke ĝi ne kaŭzu al ni novan bruldanĝeron kaj tenas ĝin sufiĉe malproksime de la fajrejo.

Tiu ĉi okupado amuzas nin; ŝajnas al ni ke laborante por la printempa sezono ni ĝin alproksimigas al ni; cetere tio ne malhelpas nin babili; mia avo igas min rakonti pri tio, kio fariĝis en la lernejo, kie mi kelkfoje, tute sensaĝe, trovis la tempon iom longa. Mi precipe amas rakonti pri la vizitoj de tiu riĉa kaj bona najbaro, kiu de tempo al tempo disdonis al ni librojn kiel premiojn. Li ankaŭ instigis nin lerni versaĵojn parkere. En tiuj tagoj la horoj pasis multe pli rapide, precipe kiam li deklamis poeziojn, kiujn li klarigis al ni perfekte.

Mia avo diris:

— Vi espereble ne forgesis ilin, ĉar ili tiel plaĉis al vi? Kaj li volis, ke mi tuj donu al li pruvon.

— Ĉu vi skribis tiujn versaĵojn? demandis li.

— Mi ilin skribis, sed mi prunte donis la kajeron kaj ĝi perdiĝis.

— Nu, mia infano, provu ripari tiun ĉi vere bedaŭrindan perdon. Mi volas, ke vi kelkafoje deklamu al mi tiujn poeziojn, kiuj ŝajnas

al mi faritaj por la infaneco kaj foje unu, foje alian, vi enskribos en vian taglibron.

Mi do nun transskribos la unuan, kiu venis al mia memoro.

Karolino kaj la birdetoj

Tra fenestro de dometo varma
Karolino la kamparon vidis.
Norda vento furioze blovis
Jam forvelkis rozoj kaj folioj;
Ĉie neĝo kaj glacio estis.
Tremegantaj de malvarmo, fringoj
Bekpikadis la sovaĝan ŝelon
De l' arbetoj nudaj, senfoliaj.
Sed plu ili ne kuraĝis kanti.
„Kompatindaj birdoj! la malsato
„Vin turmentas, pli ol la malvarmo.
„Sama Patro igis nin naskiĝi
„Per la donoj liaj mi vin nutros."
De la blanka pano la pecetoj
Disfaladis por la karaj birdoj.
Infanino, tra la hela vitro
Vi atente ilin jam observas.
Unu, du, tri!....tuta flugantaro
Ekalkuras por ricevi pecon.
Maltimema baldaŭ ĝi fariĝas;
Vi aperas, birdoj ne forflugas
La danĝeron tute ne timante.
Ĉiutage ili revenadas
Kaj eĉ fine el la mano via
Kuraĝege la manĝaĵon prenas.
Ĉarma por vi estas tiu tempo,
Se nur vintro ĉiam povus daŭri!
Sed primolo iom maldiskrete
Ekridetas al printempa suno.

Kaj aperas ankaŭ violeto
Sub la ŝirmo de grosuio verda.
Nun la birdoj nutras sin en kampo.
Vintro pasis, flugis for fringetoj.
Nu adiaŭ, sed en viaj kantoj
Karolinon, birdoj ne forgesu!

1an de Decembro.

Mi sentas veran teruron skribante la hodiaŭan daton. Se kelkaj tagoj de la novembra monato ŝajnis al ni longaj, kiel estos dum la monato en kiun ni eniras? Se ĝi almenaŭ povus esti la lasta de nia mallibereco! Sed mi ne kuraĝas pensi pri la fino. La neĝo tiel multe amasiĝis, ke tuta somero ŝajne ne sufiĉos por ĝin fluidigi. Ĝi nun atingas la altecon de la tegmento, kaj se mi ne suprenirus sur ĝin ĉiutage por balai ĉirkaŭ la kameno ni jam baldaŭ ne povus malfermi la kovrilon nek ekbruligi fajron.

Mi havas grandan kompaton al mia avo, kiu neniam povas eliri el tiu tombo. Mi demandis lin hodiaŭ matene, kion li plejmulte bedaŭras kaj li respondis:

— Radion da suno. Kaj tamen, aldiris li, nia sorto estas certe malpli malfeliĉa ol tiu de multaj malliberuloj, el kiuj kelkaj, ne pli ol ni, meritis kaptitecon. Ni havas fajron, ofte lumon; ni ĝuas en nia malliberejo certan liberecon, kaj trovas en ĝi distraĵojn, kiujn ne prezentas la kvar muroj de karcero; ni ne havas ĉiun tagon viziton de gardisto mal-

fidema, kruela aŭ nur indiferenta por niaj doloroj; la malfeliĉoj, kiujn ni suferas per la volo de Dio neniam havas la maldolĉecon de tiuj, kiuj, laŭ nia opinio devenas de la maljusteco de l' homoj; fine ni ne estas solaj, infano mia, kaj se via devigata ĉeesto en tiu ĉi domo tre ĉagrenas min, ĝi subtenas min kaj estas al mi necesa! ŝajnas al mi ke vi ankaŭ ne estas malkontenta de via kunulo; eĉ Blankineto mem estas plidolĉigo de nia kaptiteco, kaj mi certigas vin, ke mi ne amas ŝin nur pro ŝia lakto.

Tiuj ĉi lastaj vortoj igis min pripensi, kaj mi proponis alproksimigi al ni tiun ĉi kompatindan beston.

— Ŝi havas grandan enuon tute sola, diris mi, ofte ŝi blekas; tio povas malutili al ŝi kaj sekve ankaŭ al ni. Kio malhelpas nin loĝigi ŝin tie ĉi en angulo? La loko estas sufiĉe granda por ni kaj por ŝi; ŝi estos al ni tre danka pro la honoro, kiun ni faros al ŝi, kaj eble ŝi estos poste pli bona nutristino.

Mia propono estis favore akceptata kaj tuj mi komencis labori; mi pretigis en angulo de la kuirejo, kie ŝajnis al mi, ke ĝi plej malmulte ĝenos nin, manĝujeton, kiun mi fiksis al la muro per kelkaj najloj; mi plisolidigis la tuton per du palisetoj kiel apogiloj kaj ne atendante pli longe, mi tuj alkondukis Blankineton ĉe ni.

Kiom danka ŝi estas al ni pro tiu ŝanĝo! Ŝi estas ekstreme ĝoja kaj ne ĉesas danki nin. Se tio devus daŭri ŝi estus iom laciganta; sed

kiam ŝi estos kutiminta al sia nova situacio, ŝi estos pli trankvila ol antaŭe. En tiu ĉi momento, dum mi skribas tiujn ĉi detalojn sur la paperon, ŝi kuŝas sur sia freŝa pajlaĵo; ŝi remaĉadas kviete, kaj rigardas min per tiel feliĉaj okuloj, kvazaŭ ŝi divenus, ke mi skribas ŝian historion. Nenio mankas al ŝi nun, kaj en la dometo estas unu feliĉa estaĵo.

2an de Decembro.

Ni forgesis la tempon, post nia vespermanĝo, farante projektojn por la tempo, kiam ni foriros de tie ĉi, kaj estas tiel malfrue, ke mi ne povas longe skribi en mian taglibron. Ĝi estus ĉiam bone plenigita kaj tre interesa se mi scius ripeti ĉion kion aveto rakontas al mi; sed li volas ke mi faru prefere la historion de nia vivo ol raporton pri niaj konversacioj. Hodiaŭ mi kontentiĝos per skribado de fablo, kies ideon li trovis bona kaj kiu ŝajnis al li doni lecionon, el kiu multaj homoj devus profiti. Oni efektive tre ofte vidas homojn, kiuj kulpigas aliajn pro la malbono, kiujn ili faras al si mem.

La Plugisto

Kurbiĝinta sur la sulko, Petro
Siajn bovojn kun kolero puŝis,
Kaj frapante ilin per la vipo
„Senkuraĝaj bestoj!“ li kriadis.

Jam la tago pasis, tuj noktiĝos
Kaj de via tasko, mallertuloj
Vi apenaŭ finis la kvaronon;
Senkompate mi vin morgaŭ buĉos.

— Dank' al Dio, diris la maliuna,
Pro laceco mi jam preskaŭ mortas;
Tujan morton certe mi preferas
Al plugado teda kaj senfina.

La plugilo al ni kompatindaj
Altiradas batojn kaj minacojn;
Ĝi meritas sola la insultojn.
Ĝin admonu, estas n i senkulpaj!

— Nu plugilo, kriis la brutulo.
Iru, iru, ĉu vi do ne aŭdas?
Antaŭ kaj post vi ni klopodegas
Kaj vi dormas, vi malsaĝa ilo!

— Oni plendas pri mi, maljusteco!
Ĝi respondis kun profunda ĝemo.
Mi plej bone faras mian eblon,
Vidu tiun obeeman feron!

Tiel glata, brila ĝi ja estas
Kaj varmega kvazaŭ el la fajro;
Sed, distranĉi pecon, kiu povas
De tiela malmolega tero?

— Estas do vi malbenita kampo,
Kiun devus trafi mia venĝo,
Diris viro, teron frapegante;
Pensu, ke mi estas via reĝo.

Kial ĉiam volas vi oferon?
Mia ŝvito falas en la sulkon.
Miajn larmojn volus vi ensorbi,
Eĉ la sango ankaŭ plaĉus al vi.

Sammomente el la ter' leviĝas
Laŭta voĉo. kiu forte krias:
Se vi ne tuj ĉesas viajn plendojn
Mi forprenos ĉiujn miajn donojn.

Viaj bovoj, kampo kaj plugilo
Bone taŭgas, nu vi, sensaĝulo,
Ĉiujn mankojn sola vi enhavas
Kiujn vi nur en aliaj trovas.

Vi insultas! Iru por lernadi
De spertuloj de l' vilaĝo via
La plugilon bone kondukadi
Kaj silentu, ĉar vi estas kulpa.

3an de Decembro.

Hodiaŭ mi estis altirita sur la tegmenton per la brilo de l' suno. Seka kaj malvarma vetero sekvis la longan neĝadon. Kiel tiu ĉi blanka tapiŝo blindigis miajn okulojn kaj kiel bela ŝajnis al mi la arbaro! Mi apenaŭ kuraĝis diri al aveto la plezuron, kiun mi havis; sed post pripenso, mi ektrovis ion, kio ŝajnis al mi ekstreme simpla kaj mi riproĉas min, ke mi ne havis pli frue tiun ideon. Temas pri forigi la neĝon antaŭ la pordo kaj fari vojon kun malforta kruteco forjetante la neĝon ambaŭflanke. Mi jam komencis la laboron; mia avo povos baldaŭ vidi tion, kion li plejmulte bedaŭras: radion de suno! La tutan tagon mi laboris; estas pli da laboro ol mi kredis; sed mi estus progresinta multe pli se mi estus havinta permeson. Jen miaj vestoj, kiuj

sekiĝas antaŭ la fajro kaj mi envolvis min en la litkovrilon por noti en mian taglibron la feliĉan entreprenon de hodiaŭ.

4an de Decembro.

La laboro progresas; mi daŭrigis la tutan tempon, dum kiu aveto lasis min fari. Li estis pensinta antaŭ mi, pri tiu laboro, kaj mi riproĉis lin, ke li nenion diris. Li timis por mi lacecon kaj malsekecon kaj ne volis uzi por sia profito la fortojn de sia nepo.

5an de Decembro.

Ni povas eliri el la domo, la vojo estas trafosita, ĝi estas piedpremita; mi havis la plezuron konduki mian avon sur ĝin, subtenante lin de unu flanko, dum li de la alia apogis sin sur barilon, kiun mi fiksis ĉe unu fino al la domo kaj ĉe la alia sur foston enplantitan en la neĝon.

Ni restis kelkajn momentojn ĉe la fino de nia aleo, kiu ne estas longa, sed ĉar la tago estis malhela ni sentis nin tute malĝojaj vidante tiun nigran arbaron, tiun nubekovritan ĉielon kaj tiun neĝon, kiu ĉirkaŭas nin kun morta silento. Unu sola vivanta estaĵo montris sin al niaj okuloj, ĝi estis rabaĵa birdo, kiu pasis malproksime de ni kun raŭka krio. Ĝi direktis sin al la valo kaj flugis kontraŭ nia vilaĝo.

— Ĉe la idolistoj, diris mia avo kun malgaja rideto, oni estus klariginta kion signifas tiu ĉi birdo, lia flugado, lia krio; superstiĉaj homoj estus vidintaj en tiu ĉi renkontro kaŭzojn de timo aŭ espero. Ĉu ni baldaŭ aliros la vojon, kiun tiu birdo ŝajnas signi al ni? Dio sola scias; sed li estas tro bona kaj tro saĝa por malkaŝi al ni nian sorton kaj se li tion volus fari, li ne elektus sensaĝan beston por profeti. Venu, mia kara Ludoviko, ni volas atendi la decidojn de lia volo. Mi dankas vin pro la peno, kiun vi havis por mi. Alian tagon mi plimulte profitos de ĝi.

Ni revenis internen kaj kontraŭ mia atendo, ni estis pli seriozaj ol kutime; malgraŭ niaj klopodoj la interparolado malvigliĝis. Tiel ofte la rezultato ne pravigas la esperon. La malhela vetero ne sufiĉas por klarigi nian ĉagrenon; ĝi devenas, mi kredas, de tio, ke ni povis eliri el la domo, ni imagis, ke ni estas liberaj kaj poste sentis nin kaptitaj kiel antaŭe.

6an de Decembro.

Ideo kondukas al alia. Tiun ĉi fojon mia avo bonvolis paroli unue; li sciis ke mi profitus, tiel multe kiel li de lia propono. Li konsilis min forigi la neĝon antaŭ la fenestro. Mi bezonos pli da tempo ĉar la amaso estas pli granda en tiu loko. Mi eklaboris sed ne volis, ke mia avo helpu; li ne insistis, sciante kiom valora por mi estas lia sano.

— Mi ne volas, diris li, elmeti vin al la plej malgranda embaraso por havigi al mi distraĵon.

7an de Decembro.

Nia laboro malprogresis; la neĝo ree faladas, kaj la vento estas tiel forta, ke mi ne havis permeson resti ekstere. Mi nur forŝovelis la neĝon falintan antaŭ la pordo. Mi devos konservi la faritan laboron, sed al mi ne mankos persisteco.

Estas dank' al persisteco, ke mi prosperis melki la kaprinon tiamaniere, ke aveto ne plu timas lasi al mi tiun zorgon, kaj tamen nia vivo dependas de tiu de Blankineto, kiu tre feliĉe ĝuas bonegan sanecon. De kiam ŝi ne plu enuas, ŝi donas pli da lakto.

8an de Decembro.

La vetero estis hodiaŭ pli milda, kaj mi daŭrigas la laboron, sed okazis al mi akcidento pri kiu mi komence nur ridis kaj kiu tamen estus povinta havi gravajn konsekvencojn. Jam, mi estis foriginta multan neĝon, kaj mi kredis ke mia laboro estos baldaŭ finita, kiam la amaso, kiun mi estis forĵetinta super mia kapo, elfalis sur min kaj kovris min tute. Mia avo, kiu ĵus estis reveninta en la domon, povis nenion suspekti, ĉar li donis al mi antaŭe la necesajn klarigojn por protekti min kontraŭ tia akcidento; mi ilin neatentis kaj

mi ne volis lin voki tuj por ne timigi lin; mi esperis ke mi sukcesos eltiri min sola el tiu situacio. Efektive mi prosperis liberigi mian kapon, sed estis ĉio, kion mi povis fari sen helpo. Post longa klopodado, kiu restis vana ĉar la neĝo ne prezentis al miaj piedoj firman bazon, mi estis devigita voki mian avon por helpo.

Li alvenis tute maltrankviligita, kaj trenis sin kun peno ĝis la loko, kie mi estis enneĝigita. Kiam unu brako troviĝis libera dank' al lia helpo, mi baldaŭ povis tute eliĝi sed mi nefacile ricevos la permeson daŭrigi tiun laboron, kies sukceson nur mia senpripenso malhelpis.

9an de Decembro.

Sinjoro, havu kompaton al ni! Ni ĵus pasigis la plej teruran tagon de nia kaptiteco. Mi ankoraŭ ne sciis, kio estas uragano en la montoj. Eĉ nun, ĉu mi povas diri, kio okazis ekstere? Ni aŭdis timegigajn muĝojn; kiam ni provis ekmalfermi la pordon, ni vidis neĝoturniĝojn tiel rapidajn kaj la vento enbloviĝis tiel furioze en la dometon, ke ni havis la plej grandan penon puŝi la riglilon. Ni ankaŭ devis fermi la kamen-kovrilon, kaj cetere ne estis eble ekbruligi fajron ĉar la tuta fumo revenis internen.

Tiel, ni restadis longe en la mallumo melkinte Blankineton kaj matenmanĝinte per

ŝia lakto; sed antaŭ ol estingi la lampon, ni legis kelkajn paĝojn de la „Imitado"; poste mia avo subtenis mian kuraĝon per sia sereneco; liaj seriozaj kaj piaj paroloj miksiĝis en la mallumo kun la bruo de l' ventego. En la momento, kiam oni estus kredinta, ke la malbeno de Dio premegis nin, li parolis pri lia kompato.

— Tiu ĉi sama potenco, diris li, kiu hodiaŭ montriĝas tiel timinda, baldaŭ aperos plena de dolĉeco kaj amo; nun ĝi ŝajnas minaci la naturon per kompleta detruo, kaj ni kredas refali en la ĥaoson en kiu troviĝis la naturo antaŭ la ses tagoj de Moseo; ni blinduloj! tiuj ĉi ventegoj estas nur la preparaĵoj de nova kreado. Vi revidos, infano, niajn reverdiĝintajn ebenaĵojn, niajn orkolorajn grenkampojn; viaj rigardoj traflugos ankoraŭ la florplenajn fruktoĝardenojn kaj la ĉielan spacon, tute brilan de lumo. Ĉu tiu ĉi mirinda ŝanĝo igos vin rekoni la plejpotencon de la eterna Dio? Ĉu vi scios en tiu estonta tempo ami lin kiel vi lin hodiaŭ timas? Vidinte per kiaj grandegaj fortoj la naturo amasigas sur la montojn la trezoron de la fertiligaj akvoj, kiun ĝi poste lasas flui en niajn valojn; kompreninte en tiu ĉi punkto la celon de la Antaŭvideco, ĉu vi scios submeti vian malfortan inteligentecon al ĝia senfina saĝeco? Ĉu vi komprenos, ke estas tiel prudente kiel respekteme kaj dolĉe konfidi al ĝi? Se tia estas la frukto de niaj doloroj, la terura tago, kiun ni pasigas

devas esti kalkulata inter la plej feliĉaj de via vivo.

Per tiaj admonoj mia avo okupadis mian penson kaj subtenadis mian kuraĝon. Ni sidis sur nia lito, kaj ni estis etendintaj sur nin garbon da pajlo. Mia avo rimarkante ke atako de ploro kaptis min, ĉirkaŭprenis mian kolon per unu brako kaj plektante la manojn sur mia brusto, li tenis min longe en siaj brakoj dirante nenion. Fine li rimarkis, ke mi estis pli trankvila, kaj ke mi ne atendis la finon de la ventego por konsoli min; ĉar ĝi kontraŭe estis ankoraŭ en sia tuta forteco.

— Nu, diris li, ĉu vi lasos min paroli sola? Ĉu vi havas nenion por respondi? aŭ ĉu vi ne havas sufiĉe da spirita kvieteco por esprimi, kion vi sentas?

— Ne kredu min tiel nesaĝa, respondis mi. Mia emocio kaj miaj ploroj ne devenas de koro malforta kaj malbrava kaj tiel malinda je la via.

— Se tiel estas, mia infano, li aldiris frapante sur la pajlon, kiu kovris nin, vi povus deklami al mi unu el viaj kantoj de la lernejo. Sendube la grenrikoltoj ne estas forgesitaj en ili kaj tiu ĉi pajlo, kiu ŝirmas nin kontraŭ la malvarmo, post kiam ĝia greno nutris nin, memorigas al mi nian belan grenrikolton de tiu ĉi jaro.

— Vi mem memorigas al mi, diris mi, tiun kanton, kiun mi plej multe amas; jen ĝi estas:

Kanto de la rikoltistoj

Leviĝu por la grenrikolto
Junuloj kaj vi junulinoj!
Ĉu aŭdas vi helan kantadon
De l' alte fluganta alaŭdo?
Detruos ni ĝian nesteton
Pereos la dolĉaj idetoj!

Tagiĝo briligas ĉielon;
Ho lando, naturo belegaj!
Sur lago ŝipisto glit-remas.
Al kampo paŝtisto eliras.
Anoncas arĝenta sonoro
La horon de l' frua laboro.

Laboro, vi estas feliĉo!
Espero de la kulturistoj.
Martelo falĉilon akrigas
Al kampo la bando forkuras
Kaj baldaŭ disfalas la spikoj
De l' tero riĉega orkrono.

Por ilin en garboj kunigi
Virinoj, infanoj alkuru!
Junuloj la taskon vi havu
La faskojn fortike kunligi;
Plenigu nun la veturilojn
Per tiu riĉega rikolto.

Ĉielo ĝin al ni donacis
Infanoj kronitaj per floroj
Sidantaj sur oraj la garboj
La kanton plej belan ekkantu!
Kaj gaje vi hejmen revenu
Laŭdante la Patron de l' homoj.

Meze de mia deklamado, alvenis ventblovo pli forta ol ĉiuj aliaj, kaj ni aŭdis la pordon, kraki tiel forte, ke ni ambaŭ ektremis; tamen mi finis miajn strofojn, kaj mia avo, kuraĝiginte min per kelkaj vortoj, silentis momenton kaj diris:

— Ni ne havas fajron hodiaŭ; ni kompense povas havi lumon iom pli longe; cetere estos bone vidi tion, kio skuis la pordon kaj, se ia akcidento okazis, ripari la difekton kiel eble plej bone.

Ni do leviĝis kaj lumiginte la lampon ni ekvidis provante malfermi la pordon, ke maso da neĝo refalis sur ĝin, tiamaniere ke ni estas enfermitaj kiel antaŭe. Eble estis kaŭzo por ke mi multe ĉagrenu, sed mi sciis submetiĝi sen plendo al tiu ĉi nova kontraŭaĵo.

— Pripensu, diris aveto, se la uragano estus surprizinta nin antaŭ ol la dometo estis subigita sub la neĝo, ĝi eble ne estus elteninta la blovadon. Ni akceptu kun respektplena rezignacio situacion al kiu ni hodiaŭ ŝuldas nian savon el la plej granda danĝero.

La ventego daŭras ankoraŭ nun, dum mi skribas. Ni havis la ideon boligi nian lakton sur flamo de abifruktoj. Tiu ĉi fajro ellasas malmulte da fumo kaj eligas agrablan odoron de rezino, kiu plaĉas al mi. Ni iom varmiĝis. Ĵus ni legis kelkajn paĝojn de nia bona konsilanto, kaj ni trovos, se plaĉas al Dio, iom da ripozo sur nia pajlo.

10an de Decembro.

Hodiaŭ ni malpli aŭdis la venton; ni vere nescias kia vetero estas, sed ni kredas, ke la neĝo daŭradas fali multege, almenaŭ la kamenfermilo estas ŝarĝita de ĝi kaj mi ne povis ĝin malfermi malgraŭ ĉiuj klopodoj. Ni estas devigitaj bruligi nur abifruktojn spite la fumo. Mi elpensis rimedon por iom heligi nian mallumon; mi trafendas ŝtipon de abia ligno en maldikaj tabuletoj, kiujn mi ekbruligas ĉe unu fino; ili brulas kelkajn momentojn, sed kiom mi bedaŭras mian fenestron! Ĝi estas tiel obstrukciita kiel antaŭe. Nu, kiam la vetero permesos mi faros novan provon por havigi al ni iom da lumo kaj da libereco.

11an de Decembro.

La malvarmo estas multe pli akra. Kvankam ni estas subigitaj sub la neĝo, kio eble malhelpas nin aŭdi la ventegon, ni sentas nin kavazaŭ glaciiĝintaj ĝis la ostoj kaj, por ne suferi pro malvarmo, ni metas nin en nubo de fumo. Malfeliĉe Blankineto ŝajnas suferi kun malpli da pacienco ol ni, tamen ni ne eĉ pensas remeti ŝin en la bovinejon, kie estus al ŝi malvarme, kaj kie ŝi sendube enuus.

Mia avo certigas, ke la frosto, kiu igas sin senti en tia grado, en nia tiel bone fermita domo, devas esti fortega. Li supozas, ke la vento nun blovas el nordo.

13an de Decembro.

Ni havis hieraŭ grandegan teruron; eĉ hodiaŭ mi estas apenaŭ sufiĉe trankvila por skribi tion, kio okazis. Ho ve! ni ankoraŭ ne estas certaj, ke ĉiu danĝero malaperis.

Mi estis okupata melkante la kaprinon, dum mia avo ekbruligis fajron, kiam ŝi subite streĉis la orelojn, kvazaŭ frapita de eksterordinara bruo kaj ŝi komencis tremi per ĉiuj siaj membroj.

Mi rimarkigis tion laŭte, parolante al ŝi:

— Kion do vi havas, mia kara Blankineto? mi diris karesante ŝin; sed baldaŭ ni aŭdis kvazaŭ sur niaj kapoj teruraĵn blek-kriegojn.

— Lupoj! mi ekkriis.

— Silentu, mia infano, karesu Blankineton, diris aveto, kaj li mem proksimiĝis al ŝi kun salo. Ŝi daŭrigis tremadi kaj la kriegoj ne ĉesis aŭdigi sin.

— Nu, Ludoviko, kia estus nia sorto, se vi estus fosinta vojon ĝis la fenestro? diris li mallaŭte. Kiu scias ĉu eĉ la kameno ne estus ebla enirejo por tiuj malsataj bestoj?

— He, ĉu eĉ nun estas neniu danĝero por ni?

— Mi esperas, sed ni parolu mallaŭte, kaj ne ĉesu karesi Blankineton; ŝiaj blekoj povus perfidi nin.

Oni povus kredi, ke ŝi divenis ĝin, ĉar ŝi ne faris eĉ la plej malgrandan bruon. Aveto sidiĝis apud mi; mi ĉirkaŭtenis la kaprinon en

miaj brakoj; lia mano estis apogita sur mia ŝultro kaj mi bezonis rigardi lian trankvilan kaj serenan vizaĝon por ne morti pro timo.

Ĉio, kion mi ĝis tiam suferis ne povas esti komparata kun la teruro, kiun mi hieraŭ sentis dum preskaŭ la tuta tago. Ni pasigis ĝin apud Blankineto kaj, diversfoje ni aŭdis la kriegojn de la lupoj. Unu momenton, ili fariĝis tiel fortaj, ke mi jam pensis ke nia lasta horo estis alveninta.

— Ili fosas la neĝon, mi diris, premante aveton en miaj brakoj; ili baldaŭ manĝos nin.

— Mi ne volas trompi vin, mia infano, nia situacio estas malfacila sed mi tute ne kredas ĝin danĝera. Tiuj ĉi lupoj povas trakuri la kamparon ĉar la neĝo malmoliĝis supraĵe, sed ili ne restos longe sur la altaĵoj. En tiu ĉi sezono ili alproksimiĝas al la ebenaĵo kaj al la vilaĝoj. Ili eble alportis tien ĉi korpon de iu besto; manĝegante ĝin, ili interbatalas kaj faras tiun bruegon kiu timigas nin. Se ili ekscius ke ni estas tie ĉi, ili ne povus trabori la tegmenton kaj la subtabulojn, ili ne divenus, kie troviĝas la fenestro; ili ne scius levigi la kamen-fermilon, ili nur povus lacigi nin per siaj kriadoj. Ankaŭ en tiu ĉi okazo, ni rekonu, mia kara infano, la bonecon de la dia antaŭzorgemo; la neĝa blovado protektis nin, ĝi detruis la laborojn kiuj elmetis nin al danĝero sekve de nia nesufiĉa singardemo; ĝi rifuzis al ni la lumon, kiun ni deziris ĝui, sed savis nian vivon. Kia feliĉo, ke tiuj lupoj

ne alvenis dum vi laboris ekstere! Estonte ni estos pli prudentaj.

— Mi diris malgaje: Konsekvence, nia kaptiteco estas ĉiam pli severa! La vintro nur komenciĝas; la malvarmo povas fariĝi ankoraŭ pli akra; neniam ni eliros el tie ĉi!

Jen kiel ni parolis hieraŭ la tutan tagon. Ĝis la vespero ni aŭdis la kruelajn lupojn. Fine ni kuŝiĝis sed mi nemulte dormis, kvankam la krioj estis tute ĉesintaj.

Hodiaŭ ŝajnas al mi, ke mi aŭdis ilin pli ol unu fojon; mia avo certigas ke mi eraras. Fakte, Blankineto ne plu tremas; ŝi manĝas, remaĉas kaj dormas kiel kutime kaj ni opinias, ĉar ŝi estas trankvila, ke ni ankaŭ povas trankviliĝi.

14an de Decembro.

De kiam mi scias, ke nova danĝero nin minacas, mi sentas min malĝoja kaj malvigla. Ne nur la abomena ideo esti disŝirita de la lupoj min persekutas, ankaŭ ĉagrenas min la penso, ke mi ne povos plu kiel antaŭe eliri kelkajn momentojn el mia malliberejo kaj enspiri la liberan aeron; same mi devas forlasi la planon senneĝigi la pordon kaj la fenestron, kio estus farinta nian situacion pli tolerebla.

Antaŭ tiu ĉi nova akcidento, mi faris al mi preskaŭ gajan bildon pri la estonteco: Mi redonis al aveto la vidon de l' suno; ni ĝuis proksime de la fenestro iom da heleco, ni estis

kelkafoje distritaj per la eksteraj objektoj; mi atendis, ŝajnas al mi, sen troa senpacienco la fluidiĝon de la neĝoj kaj la momenton sekvi la riveretojn en la ebenaĵon.

Nun, kia diferenco! Ni ne plu scias kio okazas ekster la dometo; ĝi fariĝis malkomforta pro la restado de la fumo, ni devus por liberigi nin de tiu ĉi malagrablaĵo oferi nian sendanĝerecon. Dio volu, ke la kreskanta malkvieteco kaj la ĉiama enfermiteco ne malsanigu nin!

Mia avo vidas mian senkuraĝecon kaj kondamnas ĝin; li memorigas al mi la sentojn, kiujn mi esprimis dum la lastaj tagoj, li trovas min tiel malsimila ol mi estis, ke li ne rekonas min plu. Mi opinias kiel li, kaj mi ĝin konfesas; mi nun kuŝiĝas tre ĉagrenita pro mia sorto, sed mi estas ankoraŭ pli malkontenta pri mi mem.

15an de Decembro.

Estas hodiaŭ dimanĉo. Kion faras niaj amikoj kaj najbaroj dum tiu ĉi vespero, kiun mi pasigas tiel malgaje? Ĉu ili pensas pri ni? Jes, sendube, se mia kara patro estas kun ili; sed se li pereis volante savi nin, eble la aliaj jam forgesas nin; ni estas mortintaj por la mondo. Oni ĝuas en la vilaĝo la ripozon de l' vintro, oni gaje manĝas la fruktojn de l' jaro, oni vizitas sin reciproke, oni pasigas la

vesperon apud brila fajro aŭ varma forno. Neniam mi sentis ĝis nun, kiel necesaj por nia feliĉo estas la aliaj homoj. Oni laboras komune, kaj la laboroj estas malpli penigaj, oni havas komunajn plezurojn, kaj ilia valoro duobliĝas.

Ha! se la Plejpotenco permesas, ke mi iam revenu en la mezon de miaj gefratoj, kiel dolĉe mi ĝuos ilian ĉeeston! Kia plezuro aŭdi la bruon kaj vidi la movadon de la vilaĝa societo! Kia feliĉo senti sin ĉirkaŭita de najbaroj, kiuj nin amas kaj protektas! Kia dolĉeco fari al si reciprokajn servojn! Sed niaj amikoj verŝajne scias kiel ni suferas tie ĉi, ĉu ili povas lasi nin en tia kruela forlaso?

— Ne restu hodiaŭ vespere, diris mia aveto, kun tiel dolora penso; tio estus malbone fini la tagon dediĉitan al la Sinjoro. Se la homoj forgesas nin, ni pardonu ilin, por ke ni ankaŭ estu pardonataj de Tiu, kiun ni tro ofte forgesas. Vi bedaŭras la societon de viaj proksimuloj; la ĉeesto de via ĉiela Patro devus sufiĉi por doni al vi pacon kaj ĝojon.

Mi respondis:

— Vi helpos min, mia kara avo, retrovi la piajn sentojn, kiuj plenigis min antaŭ ol mi vidis min elmetita al pli kruela morto. Donu al mi, Dio mia, la virton de viaj sanktaj martiroj, kiuj povis akcepti, benante vin, la plej terurajn turmentegojn. Se mi devas oferi tie ĉi mian vivon, donu al mi la kuraĝon por tion plenumi! Eĉ infanoj glorigis vin meze de la turmentoj.

16an de Decembro.

Kaprina lakto, kelkaj pecoj da seka kaj malmola pano, terpomoj kuiritaj en akvo kaj manĝataj kun iom da salo, jen la kunmetado de nia ĉiutaga nutraĵo. Sed, kun la terpomoj, ni devas esti tre ŝparemaj, la provizo estas malgranda. Iafoje por varii la guston ni kuiras ilin en la cindro. Tiel mi preferas ilin.

Ĝis nun aveto ne volis ektuŝi la pulvoron de kafo, sed li fine decidiĝis por provi iom plibonigi sian apetiton. Niaj lastaj maltrankviliĝoj malsanetigis lin. Tiu ĉi frandaĵeto, kiun li konsentis preni, laŭ mia peto, faris al li iom da bono. Li volis, ke mi ankaŭ havu mian porcion, sed mi nepre rifuzis. Ni konservos tion por la okazoj de neceseco, kaj mi ĝin tute ne bezonas.

Lakto sendube povas sufiĉi al la homo por lia nutrado; la paŝtistoj sur la Alpoj nutras sin per ĝi grandan parton de l' jaro, kaj la popoloj kiuj manĝas panon kaj viandon, kaj trinkas vinon, ne estas ĉiam tiel fortikaj. Sed en niaj vilaĝoj oni ordinare havas pli da varieco, cetere la kutimoj de maljunulo estas pli malfacile ŝanĝeblaj, kaj mi estas tre ĉagrenita vidi aveton devigita trinki nur lakton de Blankineto.

Li mem ne volas, ke mi kompatu pri lia sorto, kaj ĉar mi diris hodiaŭ vespere kiom mi suferis pensante pri la multaj aferoj kiuj mankas al li, sekve de mia malobeo, kiu estis la unua kaŭzo de l' malfeliĉo, li interrompis min:

— Vi povas paroli pri aferoj pli agrablaj, infano mia. Por fini la tagon, deklamu al mi unu el tiuj versaĵetoj, kiujn vi scias parkere.

Turnante la okulojn al Blankineto, kiu ankaŭ ŝajnis preta aŭskulti min, mi rememoris fablon, kiu traktas pri personoj de ŝia speco. Jen ĝi estas:

La sovaĝaj kaprinoj

Dum vintro malvarma paŝtisto malfermis
La pordon al montaj sovaĝaj kaprinoj.
Jam oni ne trovis nutraĵon sur montoj
Do ili volonte l' inviton akceptis.
Por ilin reteni en sia loĝejo
Dum tuta la vintro li tiel bonege
Nutradis kaj flegis la gastoin malsatajn,
Ke ili grasiĝis, dum hejmajn kaprinojn
Li tute forgesis kaj ne plu zorgadis,
Ĝis ili fariĝis maldikaj, mizeraj.
Ilia manĝujo restadis malplena,
Ĉar nur pri la novaj kaprinoj li pensis.
Sed unu matenon li trovis mortinta
La tutan malnovan fidelan bestaron.
Revenis printempo, kaj ĉiu paŝtisto
Malfermis la pordon, foriris kamparon.
La nia pretiĝis por fari la samon,
Sed la kaprinaro jam konis la monton,
Ĝi tuj malaperis, forkuris por ĉiam.
Malnovajn amikojn malŝatu neniam;
Nur perdi vi povas, vi gajnos nenion.

Blekado de Blankineto en la momento kiam mi finis, ŝajnis al ni tiel gaja kaj ĉarma, ke ni ambaŭ ridis el la tuta koro. Estis la

unua elmontro de vera gajeco de la komenco de nia mallibereco.

— Nenion timu, mia belulino, diris aveto karesante ŝin. Eĉ kiam ni ne plu bezonos vin, vi ĉiam estos ĉe ni la plej amata kaprino, kaj mi promesas al vi, ke vi mortos pro maljuneco.

17an de Decembro.

— La tempo pasas, la vintro proksimiĝas, diris hodiaŭ aveto.

— Nu, la vintro proksimiĝas? ekkriis mi. Ĉu ĝi do ankoraŭ ne alvenis?

— Ne ankoraŭ laŭ la almanako. La vintro komenciĝas nur la 21an de Decembro, ĝis tiam ni estas en aŭtuno.

— Efektive mi memoras, ke la lernejestro tiel klarigis la dividon de l' jaro. Ĉu oni kredus, ke ni estas ankoraŭ en la sezono de l' fruktoj?

— Mia infano, eĉ en la valo la rikoltoj estas finitaj jam de longe kaj sur la montoj la vintro komenciĝas pli frue.

— Kaj finiĝas pli malfrue, diris mi malgaje.

— Jes, sed ĝi povas fariĝi tiel milda, ke ni estos liberigitaj de ĝi antaŭ la reveno de l' printempo. Sufiĉas, ke varma sudvento blovu dum kelkaj tagoj kaj tiu ĉi neĝo fluidiĝos pli rapide ol ĝi falis.

— De kio dependas nia vivo!

— Tio ĉi mirigas vin! Tuj de la unua horo post via naskiĝo, vi estis en tiu ĉi dependa situacio. Ni vivas ĉirkaŭitaj de danĝeroj, kiujn ni plejofte ne rimarkas, kaj tio, kion niaj nunaj cirkonstancoj povas aldoni al tiuj danĝeroj estas malmulta. Kutimu, filo mia, al la penso ke, ĉiumomente, ne-antaŭvidita akcidento, kaj eĉ ŝajne la plej malgrava, povas fini vian vivon. Tiamaniere vi restos singardema eĉ en la ŝajne plej certaj situacioj kaj firma en la plej minacaj danĝeroj.

Al tiu ĉi admono de mia avo, mi respondis, malfermante la libron de l' „Imitado" por citi al li parton rilatan al tio, kion li ĵus diris.

„Kiam estas mateno, tiel parolas la libro, pensu ke vi eble ne vivos ĝis la vespero, kaj kiam estas vespero ne estu certa vidi la matenon. Estu ĉiam pretaj tiamaniere, ke la morto ne surprizu vin nepreparitan. Multaj mortas subite kaj neatendite."

— Mi ĝoje vidas, diris aveto, kiom familiara fariĝas al vi tiu ĉi libro. Se vi daŭrigas, ĝi baldaŭ estos por vi vera amiko; ĝi ofte respondos al viaj pensoj; en la malfacilaj cirkonstancoj, ĝi estos via fidela konsilanto. Jen kiel ni devas uzi bonan libron, kaj mi certigas vin, multaj homoj posedas vastajn bibliotekojn, kaj ne scias profiti saĝe je ili, ĉar ili serĉas nur spiritan amuzadon en sia legado kaj neniel helpon por la ĉiutaga sperto. Ili vivas por legi - anstataŭ legi por vivi. Klopodu ne imiti ilin!

18an de Decembro.

La tutan tagon mia avo preskaŭ nenion manĝis; li provis miksi iom de kafo kun sia lakto kaj li trinkis iomete da ĝi; li konsentis, laŭ mia insista peto, trempi en ĝi malmulte da pano. Li faris klopodojn, kiujn li ne sukcesis kaŝi al mi, por ŝajni kiel kutime trankvila kaj serena; mi estis tre kortuŝita sed tio ne ĉesigis mian turmenton. Se li malsaniĝus dum nia situacio fariĝas ĉiutage pli malfacila kaj pli malĝoja! Dio mia, kiom ni bezonas vian helpon! Mi ĝin petegas nun el mia tuta koro, submetante min al ĉio, kion vi volos ordoni!

19an de Decembro.

Kial mi plendus pri la malfacilaĵoj, kiuj min ĉirkaŭas, se ĉiu estas ekscitilo por mia spirito kaj mia kuraĝo? La fumo igis nin tiel suferi, ke ni forte deziris malfermi la kamenkovrilon, se estus eble, forjetante la neĝon, kiu ĝin kovris; aliflanke ni estis detenitaj per la timo de la lupoj. Nu, hodiaŭ mi eltrovis rimedon por ĉion aranĝi, ni povos fari fajron, ni eĉ jam faris, ne suferante pro la fumo kaj ne elmetante nin al la atakoj de niaj timindaj malamikoj.

Mia avo plendis pri rigidiĝo, kaj mi ĝin atribuis al la manko de fajro, ĉar ni apenaŭ povis konsideri kiel fajron tiun de l' abiĉfruktoj, kiam ni estis devigitaj kontentiĝi kun tiu mizera varmigilo. Mi rimarkis en angulo de la bovinejo, kie ni konservas nian provizeton

da terpomoj, feran tubon tute rustiĝintan; mi sciis, ke ĝi utilis pasintan jaron, kiam oni kelkatempe varmigis la domon per forneto, kiu jam ne ekzistas nun.

— Se ni povus, diris mi, fiksi tiun ĉi tubon sur la kovrilon, farinte en ĝi truon?

— Via ideo estas bona, respondis aveto, sed la efektiviĝo prezentas multajn malfacilaĵojn. Kiel ni farus tiun truon? Kiel vi fiksus vin tie supre por ĉi tiu laboro? Tio ne estus sendanĝera kaj mi ne toleras, ke vi elmetu vin al grava akcidento por ŝpari al mi kelkajn malagrablaĵojn.

Mi restis silenta, kaj mi pripensis. Bone mi sciis, ke estus senutile insisti, dum mi ne trovis la rimedojn por plene trankviligi mian avon.

Unue, mi vidis, ke ne estus tre malfacile bori la truon. La tabulo ne estas tre dika kaj unu el niaj tranĉiloj estas provizita de sufiĉe forta segilo. Kelkajn tagojn antaŭe mi trovis en la fundo de l' tabla tirkesto, borilon, verdire tute malakran, sed per kiu oni tamen sukcesos trabori tabulon el abia ligno. Borinte unuan truon, mi povos agi per la segilo enigante ĝin tra tiun malfermaĵon kaj forsegi rondan pecon da ligno mezuritan laŭ la fera tubo.

Sed kiel mi povus starigi min sufiĉe firme por plenumi tiun laboron? Mi posedas novan kaj fortan ŝnuron; mi ĝin ligis fortike al la supra parto de l' stango, lasante iom malsupre kvazaŭ du piedingojn, en kiujn mi povos enigi miajn piedojn kiam mi alvenos supre. Plie,

mi prenis, kiel helpilon alian finon de l' ŝnuro por ĝin fiksi al la ringo de l' kamen-kovrilo kaj ligi ĝin ĉirkaŭ mia korpo.

Klariginte al la avo, kiel mi intencis fari, mi prosperis ricevi lian permeson, kaj mi laboris tiamaniere, ke la tubo tuj ĉe la unua provo pasis tra la truo, kien mi ĝin fiksis per kelkaj najloj, enbatitaj en randaĵon, kiun mi estis traborinta antaŭe.

Mi malsupreniris tute ĝoja, mi forprenis el la fajrejo la neĝon, kiun la tubo estis detranĉinta elirante, kaj mi havis la plezuron vidi la fumon de kraketanta fajro supreniri senpene.

Tiu okupado postulis la tutan tagon; sed oni devas konsideri, ke la iloj estis nebonaj, la loko maloportuna kaj precipe la laboristo nesperta. Tamen, mi ne meritas ĉion, kion mia avo afable diras al mi por rekompenci min pro mia peno. Mi jam estas sufiĉe pagita per la plezuro vidi lin, kun la piedoj ĉe la fajrejo, ĝojante pri la heleco de l' fajro kaj varmiĝante antaŭ ol iri en liton.

Aŭdinte la legadon de tio, kion mi ĵus skribis aveto postulas, ke mi ankoraŭ skribu tion, kion li diktos. Nun li mem parolas:

— Mi nescias, kion la estonteco alportos al mi, sed mi volas ke oni, se eble, ne ignoru unu solan el la motivoj, kiujn mi havas por danki Dion en ĉi tiu ŝajne tiel malgaja malliberejo. Mia nepo ĉiam esprimas sin kun la modesteco, kiu decas al li, kiam li parolas pri tio, kion li faris kaj mi estos tre zorgema ne

vundi lian humilecon per miaj laŭdoj. „La laŭdo de l' homoj ne plisanktigas nin", diris la saĝulo, kies lecionojn ni meditas ĉiutage kun ĉiam nova plezuro; „vi estas tio, kio vi estas, kaj tio, kion la homoj povas diri pri vi, ne pligrandigos vin antaŭ la okulo de Dio." Sed se la konduto de mia nepo plenigas min de ĝojo, mi bone povas permesi al mi ĝin eldiri, precipe se mi atribuas al la Sinjoro la gloron de tio, kion faras ĉi tiu infano por sia avo. Jes, filo mia, al li sola estas la gloro! Pri li vi unue pensas ĉe la plenumo de viaj devoj. Hodiaŭ, ekzemple, farante tiun malfacilan laboron, vi sendube kun fervoro petis de Dio la sukceson. Jen kiel oni ĉiam devas labori.

20an de Decembro.

— Mi ne volus, diris mia avo, terurigi vin senkaŭze; tamen ni estos pravaj antaŭzorgante por la neverŝajna okazo, kiam la lupoj revenus kaj eltrovus la vojon al nia sola fenestro. Ĝi estas malbone fermita; la vitraro estas malforta kaj malnova kaj ne povus elteni atakon de l' furiozaj bestoj; ni plibonigu nian fortikaĵon en tiu ĉi punkto.

Ni laboris kun sukceso. La sabloŝtono kiu enkadrigas la fenestron estas sufiĉe mola, ni faris du truojn supre kaj du malsupre per pinta fero, kiun ni uzis kiel ĉizilon; ni fiksis en tiujn truojn du barojn el kverkligno, elprenitajn el niaj senutilaj manĝujoj. Por plia certeco ni starigis ekstere kontraŭ la baroj,

kelkajn tabulojn enmetitajn, kiel eble plej bone en du fendojn malfermitajn ambaŭflanke. Nun ni ne plu timas atakon de la lupoj tra la fenestro.

La pordon ni havas konstante fermita per riglilo. Nur malofte kaj singardeme ni malfermas ĝin, kiam ni volas renovigi nian provizon da neĝo; ĉar por nia mastrumado ni uzas nur fluidiĝintan neĝon kaj ĝis nun, ni ne rimarkis, ke ĝi estas malpli saniga ol ordinara akvo.

21an de Decembro.

Ni ŝparas nian oleon kaj pro tio ni preskaŭ rompis grandan argilan vazon en kiu ni gardas la trinkakvon. Sed ĉi tie ankaŭ el la malbono devenis bonaĵo, kiel oni vidos. La vazo staris en angulo, kaj serĉante, mi ne scias kiun objekton, mi ĝin ekfrapis kaj renversis. Feliĉe la fundo de l' dometo estas nur el premita tero kaj la vazo ne rompiĝis.

— Ni evitu novan akcidenton, diris mia avo; fosu en tiu angulo malgrandan truon, en kiun oni enmetos la vazon, kies bazo ne estas sufiĉe larĝa kompare kun la alteco, por ke ĝi estu en sendanĝereco.

Mi lumigis la lampon por tiu ĉi laboro kaj mi prenis pioĉon; en la momento kiam mi volis fari la unuan baton: „Haltu!“ diris vive aveto, kvazaŭ frapita de subita penso. Li alproksimiĝis, prenis la pioĉon el miaj manoj kaj ekfosis mem la teron, sed per malfortaj

frapoj kaj tre singardeme. Mi demandis lin, kion li serĉas ĉar mi bone vidis laŭ lia labormaniero, ke li timas rompi ion kaŝitan en la tero.

— Mi ne eraris, mia kara amiko, diris li baldaŭ, malkovrante botelon. Kiam mi vidis vin levi la brakon mi subite rememoris, ke mi metis en tiun lokon, antaŭ kelkaj jaroj kvar aŭ kvin botelojn da vino, kiuj restadis de nia somera provizo. De tiam, mi ilin forgesis. Starigu ĉi tiun sur la tablon, ni nur bezonas trovi la aliajn. Ili ne estas multnombraj, mi scias certe; tamen, mia kara Ludoviko, mi rigardas tiun trovaĵon kiel tre feliĉan. Vidu, jen la dua kaj la tria...

Sume ni retrovis kvin botelojn, kaj mi insistis por ke aveto tuj gustumu la vinon. Kian plezuron mi havis enverŝante al li duonon da glaso de tiu malnova vino! Lia, de unu monato nesufiĉa nutrado, igas tiun vigligilon tre necesa por li; sed li ne volis preni pli multe da ĝi, konsiderante, ke tiu trinkaĵo estas ŝparinda sanigilo. Pro tiu ĉi motivo mi rifuzis havi mian parton de l' vino, ĉar mi tute ne bezonas resaniĝi je iu malsaneco.

— Almenaŭ malsekigu iom viajn lipojn por honorigi tiun ĉi tagon, parolis mia avo; ĝi estas la lasta de l' sezono en kiu oni faras la vinberrikolton aŭ se vi preferas, ĝi estas la unua de l' vintro. La suno rekomencos grade lumi pli longe kaj reproksimiĝos al ni, unue nerimarkeble, estas vere; sed ĝi estas

kiel la reveno de l' espero, ni devas ĝin saluti kun ĝoja koro.

Mi faris tion, kion oni postulis de mi, poste mi lokigis aparte kun granda zorgo tiun neatenditan provizaĵon, de kiu mi esperas feliĉan efikon por la saneco de mia maljuna amiko.

Tiu ĉi malgranda okazintaĵo revekis nian kuraĝon; longe ni babiladis; aveto faris al mi lecionon de astronomio kaj mi kredas, ke mi nun bone komprenas kiel la tero moviĝas ĉirkaŭ la suno, kiel formiĝas nokto kaj tago, vintro kaj somero, printempo kaj aŭtuno.... Rilate al la formo de nia tero, kiu estas globo, kvankam ni ne rimarkas ĝin, mi deklamis al li versaĵeton, kiun mi lernis en la lernejo.

Patro kaj Infano

Infano:

Patro, diru al mi, mi vin petas,
Kion oni post la monto trovas
Kiu al ni la vidaĵon kaŝas?

Patro:

Novan grandan spacon, oni trovas,
Kiel tie ĉi, arbarojn, kampojn,
Vilaĝetojn fine montojn novajn.

Infano:

Kion poste?

Patro:

Nu, aliajn montojn.

Infano:
Post la montoj?

Patro:
La vastegan maron.

Infano:
Post la maro?

Patro:
Ree novan teron.

Infano:
Poste?

Patro:
Oni iras, ĉiam iras
Karuleto, tiel malproksimen.
Ke irante senĉese antaŭen.
Oni trovas la finon de l' mondo
Ĉe la loko de la forirado.

22an de Decembro.

Per la geografio mi lernis, ke la popoloj loĝantaj en montaroj havas apartajn morojn. — Kaj oni ne devas miri, parolis mia avo, kiam oni vidas kiom ilia vivmaniero estas malsimila de tiu de l' aliaj popoloj. La montanoj estas enfermitaj grandan parton de l' jaro en siaj izolitaj kabanoj, kaj kiam ili eliras kun siaj brutaroj, estas ankaŭ por foriri en la solecon. Alpa paŝtisto malpli ĝuas la societon de l' homoj dum unu jaro, ol la loĝanto de niaj vilaĝoj dum unu monato. Ĉi tiu soleca vivado havas nature sur la

karakteron specialan efikon. Oni pli koncentriĝas en si mem; oni vivas en siaj propraj pripensoj; oni kutimiĝas kontraŭbatali per siaj solaj fortoj la malhelpaĵojn de sovaĝa naturo. Tiu ĉi malfacila ekzistado necese kutimigas al pacienco kaj rezignacio; estas preskaŭ la vivmaniero de tiuj ermitoj, kiujn oni prezentas al ni, kiel vivantajn en konstanta severmoreco kaj en silenta pripensado.

Tiel parolis mia avo, ĉe la lumeto de nia fajrujo, kaj al mi, li ŝajnis esti mem unu el tiuj sanktuloj, kiujn niaj prapatroj respektegis. Lia barbo komencas kovri la malsupran parton de lia vizaĝo, li portas ĉapon el griza felo, lia bruna vesto estas farita el la plej maldelikata ŝtofo; lia tuta vestaĵo prezentas strangan malsimilecon kompare kun la dolĉeco de lia rigardo kaj rideto. Kelkafoje mi restas longe rigardante lin kaj kiam mi pensas pri ĉio, kion li devas suferi ĉu pro mi, ĉu pro lia maljuneco, miaj okuloj pleniĝas de larmoj.

Sed ni zorgas forpeli de niaj animoj tiujn malgajajn pripensadojn. Tre volonte mia avo komencas konversacion kaj mi klopodas igi ĝin por li agrabla per mia atenta aŭskultado, ĉar mi ne povas rakonti al mia maljuna amiko aferojn, kiuj lin interesas. Hodiaŭ, li parolis pri la vintraj laboroj de la loĝantoj en la Alpaj kaj Juraj montaroj.

Ho, kiel mi envias tiujn, kiuj povas pasigi la vintran sezonon kun regulaj okupadoj. Se mi havus, kiel multaj el ili, la necesajn materialojn, ilojn kaj lertecon por fari tiujn

ĉarmajn objektojn el ligno, kiujn oni precipe fabrikas en la Berna „Oberlando“ kaj kiuj disvendiĝas eĉ ĝis Parizo, aŭ se mi sidus antaŭ stablo, kiel la horloĝistoj de Chaux-de-Fonds aŭ de la valo de l' lago Joux, kiuj faras horloĝojn tiel famajn pro ilia ekzakteco; se mi nur havus la necesan lignon por fari vinberujajn stangetojn, simplajn kuvetojn kaj barelojn, kiel faras aliaj loĝantoj de niaj montoj, mi ne plendus pri mia sorto; en la vivo ne estas multaj situacioj, kiuj per diligenta laborado ne povas fariĝi agrablaj aŭ almenaŭ tolereblaj.

Kiam la lampo aŭ la fajro lumigas nin, mi provas konstrui pajlajn abelujojn, sed kvankam tiu ĉi laboro estas tre maldelikata, mi ne povas ĝin fari sen lumo; mi devas interrompi ĝin la plej grandan parton de l' tago, kaj mi estas tiam feliĉa trovi en la konversacio kun aveto ĉiam novan mallaciĝon. Se silento kaj soleco aldoniĝus al la mallumo, nia situacio estus terurega.

23an de Decembro.

Aveto plendis pri doloroj kaj rigideco en la membroj. Ni ne malzorgas marŝi ĉiutage kelkajn momentojn laŭlonge kaj laŭlarĝe de nia malliberejo, tiom, kiom la malgranda spaco permesas. Tiu ĉi movado estas necesega; aveto iradas apogante sin sur mian brakon. Hodiaŭ li streĉis antaŭ la fajro siajn nudajn piedojn kaj mi rimarkis kun doloro ŝvelaĵon

sur ili. Li certigas min, ke tio ne estas novaĵo kaj ne devas maltrankviligi min.

Mi instigas lin preni ĉiun vesperon guton da vino por subteni siajn fortojn, kaj li estas tute inklina flegi sian sanecon, multe pli por eviti al mi turmentojn, ol pro amo al la vivo. Mia Dio, konservu al mi la solan amikon, kiu eble restas al mi sur la tero!

24an de Decembro.

Ni elpensas ĉiutage novan rimedon por plenigi la horojn kaj kontraŭbatali la enuon, kaj certe hodiaŭ ni ion gajnis, dank' al nia persisteco.

— Ni estas blinda dum parto de la tago, diris mia avo, sed la blinduloj tre bone scias okupi siajn manojn kaj fari laborojn, kies perfekteco mirigas nin, ni provu imiti ilin! Ĉu ni ne povus plekti pajlon nevidante? Ni devas sukcesi per la atento kaj la facileco, kiuj devenas de l' kutimo.

Ni faris unuan provon, kaj kiam ni ekzamenis la rezultaton ĉe la heleco de la lampo, ni ne estis tro malkontentaj. Mi estas certa, ke post malmultaj tagoj ni prosperos fari sufiĉe regulajn plektaĵojn.

25an de Decembro, Kristnasko.

Ni dediĉis al la preĝado kaj meditado tiun ĉi sanktan tagon. Oni devas esti malfeliĉa por senti la grandan valoron de tio, kion faris la Savinto por la homoj. Antaŭ li, kiom maldolĉa estis kredeble la malfeliĉeco!

Mia avo vive kortuŝis min rememorigante al mi, laŭ la Evangelioj, la historion de la naskiĝo, de la vivo kaj de la morto de Jesuo. Li citis al mi multajn el liaj paraboloj kaj paroladoj plenaj de dia amo. Nia dometo ŝajnis al mi kvazaŭ templo, dum li faris tiujn rakontojn, en kiuj sin miksis utilaj aplikadoj rilataj al la cirkonstancoj en kiuj ni estas.

Dume la sonoriloj tintadis en niaj valoj; la kamparanoj kunvenadis en la preĝejoj; la religiaj kantoj resonadis de vilaĝo al vilaĝo, kaj tiu ĉi festa bruo ne supreniris ĝis ni.

Ho, najbaroj miaj, vi ne scias kiel feliĉaj vi estas, kuniĝi por la preĝo post kiam vi estis disaj por la laboro! Antaŭe pro kutimo kaj infaneco, mi ne ŝatis tiun privilegion; hodiaŭ mi sentas tiun mankon tiel profunde, ke miaj okuloj pleniĝas per larmoj de bedaŭro.

Kiam mi malsupreniros de l' monto, kiel Moseo, ŝajnas al mi, ke mi portos al miaj fratoj konsilojn de saĝeco. Mi diros al ili: „Se vi estus lernintaj kiel mi, kiom necesa estas al ĉiu homo la societo de siaj proksimuloj, vi havus unuj por la aliaj nur sentojn de amo kaj bonvolo. Oni lasu kelkatempe en izoliteco tiujn, kiuj ne volas kompreni tion ĉi kaj dissemas ĉirkaŭ si malpacon kaj malamon; ili baldaŭ sentos sian malsaĝecon; ili ekscios per propra sperto, ke ne estas bone por la homo esti sola; ili amos, kiel ili amas sin mem, tiun ĉi proksimulon sen kiu la vivo ne estus bonfaro sed puno de la Plejpotenco.

26an de Decembro.

Hodiaŭ matene mia avo troviĝis malsaneta, post kiam li trinkis sian lakton, feliĉe li pli baldaŭ resaniĝis ol mi kuraĝis esperi. Sendube lia granda pacienco kontribuas por fari liajn malsanojn pli tolereblaj. Li diris kun sereneco:

— Mi estas sentima, mia kara infano. Ŝajnas al mi tute verŝajne, ke mia vivo daŭros almenaŭ ĝis la momento de nia liberigo. Estas ĉio, kion mi deziras. Se mi havus la feliĉon, antaŭ ol mi mortos, vidi vin en la brakoj de via patro, mia eksiĝo el la vivo ŝajnus al mi pli dolĉa ol mi povas diri. Sed supozante, ke plaĉus al Dio, forpreni min dum ni estas solaj en tiu ĉi domo, mi havas sufiĉe bonan opinion pri vi por esti certa, ke tio kaŭzus al vi nek teruregon nek malesperon. Kio mi estas nun por vi? Nura malhelpaĵo, embarasaĵo, kiun vi ne sentas nur pro via fila amo. Vi sola faras ĉion tie ĉi. De kiam mi komunikis al vi la sperton, kiu mankis al vi, mi opinias ke mia tasko estas finita. Kuraĝu do, kiel mi mem, antaŭvidi sentime la eblecon de iom pli baldaŭa disiĝo ol ni volus; ni estu pretaj por ĉio. Sed, mi rediras, ni povas havi bonan esperon; viaj flegoj por mi, iom pli da singardemo en la nutrado, subtenos mian vivon ĝis la printempo, kaj mi ankoraŭ unufojon vidos la reverdiĝon de l' naturo.

Nur per miaj larmoj mi povis respondi al tiuj ĉi kortuŝantaj paroloj. Longa silentado

regis poste, kaj mi bezonis multe da tempo por rekomenci mian laboron en la mallumo.

Hodiaŭ vespere, aveto ne volis trinki lakton kaj vidante, ke parto da ĝi restus neutiligita, li donis al mi la ideon fari fromaĝon el ĝi; li direktis min ĉe tiu ĉi malgranda laboro.

— Ŝajnas, ke mi ankoraŭ povas utili al vi por io, diris li ridetante.

Pro manko da kazeigilo ni kazeigis la lakton per iom da vinagro. Poste mi verŝis la laktaĵon en argilan telereton. Ĝis nun ĉio bone prosperis, morgaŭ ni vidos la rezultaton.

Miaflanke, mi ekhavis ideon, kiun aveto trovis bona, nome fari por li rostaĵon de pano trempita en vino, kiel miaj onklinoj faris, kiam ili sentis sin malbone aŭ malsanete. La efektiviĝo sekvis baldaŭ, sed kion mi ne estus doninta por havi iom da sukero por surŝuti la varmajn kaj fumantajn tranĉaĵojn! Feliĉe la vino, kiun ni retrovis multe plidolĉiĝis maljuniĝante; ĝi estas blanka vino rikoltita en bona vinjaro, „vino, kiun oni povus prezenti sur princan tablon“ diris mia avo.

— Mi dezirus nur, li aldonis, ke ĝi povu daŭrigi mian vivon ĝis la unuaj burĝonoj de l' vinberujo.

27an de Decembro.

La fromaĝo perfekte sukcesis. Mi metis ĝin sur tabuleton kaj surŝutis ĝin per salo. Ĝi estas tiel apetitdona, ke mi ne povas rigardi ĝin sen manĝdeziro, kaj tamen, kiom pli feliĉa mi estus, se mi ne estus devinta uzi nian

lakton tiamaniere! Hodiaŭ restas ankoraŭ sufiĉe da lakto por fari duan fromaĝon. Mia avo manĝetis nur iom da terpomoj kuiritaj en la cindro. Krom tio iomete da pano kaj da vino estis lia tuta nutraĵo. Ho ve! li eble suferas, kaj malgraŭ ĉio, mi vidas nur tro klare, ke liaj fortoj foriras.

28an de Decembro.

Nun, mia avo preferas leviĝi pli malfrue kaj kuŝiĝi pli frue. Kiam li iom moviĝis kaj paŝadis en la domo li opinias, ke la bona varmeco, kiun li trovas en la lito sub lano kaj pajlo plej multe konvenas al li. Li ne povus ŝpari siajn fortojn pli atente kaj pli malprofiteme. Ĉio, kion li faras kaj diras estas instruanta kaj kortuŝanta. Kiom da progresoj mi faris kun li dum kelkaj semajnoj! Mi jam ne rekonas min mem; mi forlasis la ebenaĵon kun ideoj kaj sentoj de infano, kaj mia spirito disvolviĝis tie ĉi kun rapideco, kiu mirigas min.

La hodiaŭa tago pasis sen ia ajn okazintaĵo. Mi laboris kiel kutime kaj preskaŭ ĉiam en la mallumo. Mi akiras tiom da lerteco per tiu ekzercado, ke ŝajnas al mi ke mia vidado eniĝis en miajn fingrojn. La palpado avertas min pri la plej malgravaj eraroj, kaj tio vekigas ĉe mi tute novan observosenton. Mi trovas ion tiel interesan en tiu ĉi agadmaniero, ke mi konsilus ĝin provi eĉ al tiuj, kiuj ne bezonas ĝin. La vido estas tro rapida kaj kompleza servisto, kiu ne lasas al ni la tempon postuli de ni mem ĉion, kion ni povus

atingi. La palpado ankaŭ estas fidela amiko, sed ĝi atendas ĝis la volo agas por fariĝi servema; ĝi lasas al la inteligenteco la zorgon direktadi kaj korekti ĝin. Tiel, ĉiu restas en sia loko: la spirito regas, la korpo obeas.

Jen miaj pripensoj pri tio, kion mi rimarkis en mi mem. Mi ne atendis antaŭ kelka tempo turni mian atenton al tiaj temoj; mi pli bone pristudis min dum tridek tagoj da kaptiteco ol dum tuta vivo da libereco.

29an de Decembro.

En la tagoj, kiam neniu okazintaĵo donas iom da varieco al nia soleca ekzistado, mi pli vive pensas pri eksteraj aferoj, kaj kiam mia penso forflugas eksteren, ĝi ĉiam unue iras al vi, mia karega patro. Tamen, mi ne scias, kie mi devas vin serĉi. Laŭ mia unua impulso mi serĉas vin en nia domo aŭ en la ĉirkaŭa kamparo. Mi vidas vin sola kaj malgaja, kun okuloj ofte turnitaj al la monto, kie ni suferas en izoleco. Vi almenaŭ scias, kie ni estas kaj vi verŝajne ne perdis la esperon revidi nin, ĉar ni ja havas tie ĉi la necesajn vivrimedojn. Sed kiel ni povas ekscii, pro kiu malhelpaĵo vi ne venis por savi nin? Vane mi ripetas al mi, ke tiuj malhelpoj ne estis pereigaj, malgaja antaŭsento diras al mi, ke la tago de nia liberigo estos ankaŭ nia unua tago de funebro.

Kial vi ne restis kun ni? Vi kredeble perdiĝis volante savi la bovinaron. En la malheleco, kiu min tiel ofte ĉirkaŭas, mi

aŭskultas kun superstiĉa timo; al mi ŝajnas, ke mi aŭdas anĝelojn avertantajn min pro mia malfeliĉo, mi kredas diveni la sekreton de Dio, kaj mi malfacile rekonsciiĝas post mia revado. Kelkaj paroloj de mia avo fine revokas min al la racio kaj prudento; mi respektas la vualon, kiu kaŝas al mi estintecon kaj estontecon. Ĉu mi perdis mian patron? ĉu mi perdos mian avon? Ho ve! mi nescias kaj sendube mi devas nescii. Dio mia, mi ne plu ofendos vin per mia malkonfido kaj maltrankvileco; mi atendos kun rezignacio vian decidon!

30an de Decembro.

La fino de l' jaro alproksimiĝas. Hodiaŭ miaj lernejaj kunuloj ĝuas liberecon, kiun ili nur tromulte avidas, ili ne iras en lernejon kaj ĝojegas pro tio. Tiaj estis ankaŭ miaj pensoj, kiam mi estis en la vilaĝo, nun ili multe aliiĝis. Kion mi ne donacus por pasigi kelkajn horojn ĉiun tagon en tiu ĉi lerneja ĉambro, kiun mi nomis malliberejo! Mi aŭdas la matenan sonorilon, kiu nin kunvenigas; ni eniras amase kun niaj libroj sub la brako; ĉiu sidiĝas en sia loko, la majstro leviĝas kaj ni leviĝas kun li; preĝo sanktigas kaj preparas la laboron.

Komenciĝas tiam konfuza murmuro de l' voĉoj, kiuj mallaŭte ripetas tion, kion ili tuj devos rediri laŭte. Kajeroj malfermiĝas ĉiuflanke kaj la bruo de l' foliumitaj paĝoj miksiĝas kun milo da aliaj bruetoj, kiujn la majstro ĉesigas frapante sur sia skribotablo per dika

fagligna liniilo. Oni interŝanĝas kaŝeme kelkajn ridetojn.

Ni nun skribos diktaĵon, ĉiuj plumoj pretiĝas; ili kune kuras sur la papero, poste venas la ekzercoj de kalkulado, legado kaj kantado.

Tiel, transirante de unu laboro al alia, en societo tre taŭga por interesi ilin kaj plaĉi al ili, la lernantoj tamen observas senpacience la lignan horloĝon. La kvieta pendolo daŭrigas sian iradon per ĉiam egala paŝo, la movigaj peziloj nerimarkeble malsupreniras kaj la distrita lernanto observas de tempo al tempo la progreson de ilia falado laŭlonge de la muro. Fine tri horoj malrapide pasis, tiu de la liberigo alvenas.

Tuj kiam la lernantaro estas forpermesita, ĝojaj krioj, vivegaj movadoj anstataŭas la silenton kaj la devigan senmovecon. Oni rapidas, kuras, saltas; ludoj komenciĝas antaŭ la lerneja domo kaj tro ofte malpacoj naskiĝas samtempe.

Mi partoprenis en tiuj laboroj kaj plezuroj; ŝajnas al mi, ke mi ilin ankoraŭ ĝuas skribante pri ili nun. Mi sonĝas tute maldorma, mi rememoras kaj forgesas....

— Ludoviko mia! parolis mia avo, kiun novan motivon vi havas por ĝemi? Ĉu mi devos malpermesi al vi la distraĵon, kiun mi mem konsilis? Estu majstro de viaj pensoj kaj de via plumo, okupadu ilin per temoj kiuj povas fortikigi vin; konsideru, ke via nuna

situacio postulas de vi firmecon, kaj ke eble baldaŭ vi bezonos ankoraŭ pli da forto.

— Ĉu vi sentas vin malpli bone, hodiaŭ vespere, mia kara aveto?

— Ne, infano, kaj se mi ĵus kuŝiĝis estas nur pro singardemo; mi volas agi tiel bone, ke post du aŭ tri monatoj, ni brave malsupreniros de la monto kun Blankineto kuranta antaŭ ni. Kiel oni ĝojos revidante nin!

— Oni ne atendos ĝis ni foriros, estu certa, kaj oni venos frapi nian pordon pli frue ol vi pensas.

— Oni venos frapi nian pordon?

Ripetante miajn parolojn, mia avo prenis seriozan mienon kaj li premis mian manon.

— Kaj se la liberiga sendito venus por alvoki min ne en la vilaĝon sed en la ĉielon, kion vi farus, infano mia? Nu, oni devas antaŭvidi la okazon kaj pretiĝi. Vi estos, mi ne dubas, bonega malsanula flegisto kaj tiel longe kiel mi vivos mi fidas al via firmeco, sed poste....restus al vi aliaj devoj.... funebraj devoj; ĉu vi povus ilin plenumi?

Tie ĉi mi interrompis mian avon per miaj ploregoj; mi petis lin ne daŭrigi. Ni kisis nin kaj enskribinte en mian taglibron tiun doloran rakonton, mi serĉos forgeson en la dormado.

31an de Decembro.

Feliĉa tago! mia avo havis pli da apetito kaj da forto; li trinkis iom da kafo kun lakto, li manĝis pli ol kutime kaj fortigis sin per

glaseto da vino. Tio, kio estas veneno, kiam ĝi estas trinkata troe, kiel multaj personoj faras, estas en la nuna cirkonstanco sanigilo, kies efikon mi benas.

La lasta tago de l' jaro bone pasiĝis. Permesu, ho Dio, ke mi vin danku pro tio, kaj ke mi finu ĉi tiun solenan tagon adorante vian potencon kaj bonecon.

1an de Januaro.

Hodiaŭ, antaŭ unu jaro, mi estis meze de mia familio. La antaŭan tagon mia patro iris en la urbon por aĉeti kelkajn objektojn, kaj mi ricevis mian parton da ili. Dum la mateno, li kondukis min en la preĝejon; ni havis kelkajn parencojn por la tagmanĝo; la infanoj dancis laŭ kantado kaj la festo finiĝis tre malfrue.

Se mi estus devinta tiam diveni, kie mi pasigos la hodiaŭan novjaron, mi certe ne estus imaginta tion, kion mi suferas kaj vidas. Okazas al la homoj tiom da neatenditaj aferoj, ke ili devus esti ĉiam singardemaj, kiel soldatoj, kiuj tute armitaj, maldormas en la proksimeco de l' malamikoj.

Mia avo opiniante, ke tiu ĉi tago estus al mi malgaja, faris ĉion, kion li povis por distri min; li bonvolis instrui min per kelkaj ludoj, kiuj postulas certajn kombinaĵojn; li faris al mi demandojn, kiuj solviĝas per ŝerco; lia konversacio estis pli humoreca ol ordinare; fine ĉe la vespermanĝo ni faris specon da festeto. Li volis, ke mi aldonu al la terpomoj rostitaj

sub la cindro mian unuan fromaĝon, kiun mi trovis bongustega kaj delikata en ĝia grado da preteco. Mi ne povis rifuzi mian parton da rostita pano. Estis festeno por ermitoj kiel ni.

La kaprino ne estis forgesita; mi elektis por ŝi la plej bonan fojnon, ŝi ricevis freŝan pajlaĵon, duoblan porcion da salo kaj trioblan mezuron da karesoj.

Mia avo deziras aldoni tie ĉi kelkajn vortojn per sia propra mano.

„En la nomo de Dio, amen!

„Povas okazi, ke mi estos disigita de miaj familianoj, antaŭ ol mi povos konatigi al ili miajn lastajn dezirojn. Mi havas nenian ĝeneralan ordonon por lasi rilate al miaj posedaĵoj, sed mi deziras rekoni la flegojn kaj síndonemon de mia kara, ĉi tie ĉeestanta nepo, Ludoviko Lopraz, kaj ĉar estas al mi neeble fari al li la hodiaŭan tagon, eĉ la plej malgrandan donacon, mi petas miajn heredantojn, ke ili anstataŭu min kaj donu al li en mia nomo:

„Mian poŝhorloĝon kun tintilo,

„Mian karabenon;

„Mian Biblion, kiu jam estis tiu de mia patro;

„Fine mian ŝtalan sigelilon, en kiu estas gravuritaj miaj ĉefliteroj, la samaj kiel tiuj de mia baptofilo kaj nepo.

„Tiuj ĉi modestaj memoraĵoj estos sendube valoraj por li pro la amikeco, kiu nin kunigas kaj kiu daŭros eĉ post la morto.

„Tia estas mia volo.

„En la farmdomo de Azindes, la 1an de Januaro 18...

Ludoviko Lopraz.

Mia respekteginda avo, permesu ke miavice mi eldiru al vi en mia taglibro mian vivan dankecon; mi sentas, ke estas por mi netaksebla feliĉo, ke mi vivis kun vi en tiu ĉi apartigita restejo. Mi ne bezonis rekompencon, aŭ almenaŭ la bona atesto, kiun vi bonvolas doni al mi jam estis sufiĉa. Povu vi ankoraŭ longe ĝui la societon de niaj amikoj kaj parencoj! Kun tiu ĉi fila deziro mi komencas la novan jaron.

2an de Januaro.

De longe ni jam aŭdas nenian bruon el la ekstero kaj nia enfermiteco estas ĉiam pli profunda. Ni konkludas el tio, ke falis multe da nova neĝo, kaj ke la domo estas verŝajne tute surkovrita de tiu maso. Tamen la fera tubo transpasas ĝin ankoraŭ, la fumo ĉiam libere eliras, hodiaŭ kelkaj neĝeroj falas tra tiu mallarĝa kanalo.

Ĉi tiuj blankaj senditoj de l' vintro estas la sola afero, kiu nin kunigas kun la ekstera mondo. Se nia horloĝo haltus, ni havus tute neniun scion pri la horoj. Restus al ni por distingi la tagon de la nokto nur la heleco, kiun ni ankoraŭ ekvidas matene tra la truo de l' fera tubo.

Kompense, ni malmulte suferas pro malvarmo en nia silenta kelo. Ni estus povintaj

timi, ke la restado en ĝi fariĝu malsaniga, sed la malgranda aerfluo, kiu kuras tra la kamentubo sufiĉas por purigi la aeron, renovigante ĝin.

Kiam ni eklumigis la lampon kaj sidas antaŭ brila fajro okupataj per nia ĉiutaga laboro, ni kelkafoje forgesas nian malfeliĉon kaj retrovas iom da gajeco. En tiaj momentoj, mi estas certa, nia situacio estus enviata de tiu ĉi aŭ tiu el miaj kamaradoj. Ĉu ni ne ofte deziris esti Robinsono sur dezerta insulo? Kaj tamen la oceana barilo, kiu lin apartigis de la aliaj homoj estis multe pli malfacile transirebla. Li povis nur esperi alvenon de iu erarinta ŝipo, kaj ni, ni estas certaj, ke tiu ĉi neĝo fluidiĝos pli-malpli frue. Dio volu nur konservi nian vivon ĝis tiam!

4an de Januaro.

Estis al mi tute neeble skribi hieraŭ vespere aŭ plivere mi eĉ ne pensis pri tio. Ho ve! mi havis tute alian aferon por fari.

La tago pasis kviete. Aveto ne havis multan apetiton, sed li plendis pri nenia malbonfarto. Vespere, post la manĝo, dum li sidis apud la fajro ĝuante kun mi tiun plej agrablan momenton de l' tago, li subite paliĝis, li svenis kaj sen mia tuja helpo, li estus ruliĝinta en la fajron.

Mi ellasis krion de teruro, mi prenis lin en miaj brakoj kaj per streĉo de ĉiuj miaj fortoj mi transportis lin ĝis nia lito, kie mi lin unue

sidigis kaj poste kuŝigis tute. La kapo kaj manoj estis malvarmaj, la sango estis alfluiĝinta al la koro kaj mi tre atentis meti nenion altan sub la kapon de la malsanulo; mi rememoris en tiu momento instruon, kiun li donis al mi antaŭ kelkaj tagoj por similaj okazoj. Mi lasis la kapon malaltan kaj la sango baldaŭ refluis al ĝi. La konscio revenis samtempe.

— Kie mi estas? Ĉu vere sur mia lito? diris mia avo.

— Jes, fakte, mi respondis. Vi havis kapturniĝon, kaj mi opiniis ĝin bone meti vin tien ĉi, kaj vi vidas, ke mi estis prava. Ĉar tuj kiam vi kuŝis, vi rekonsciiĝis.

— Li portis min ĝis tie ĉi! Dio estu laŭdata! Dume dum miaj fortoj malgrandiĝas la viaj kreskas, mia kara infano. Ni nenion perdas; ni kontraŭe trovas en tiu ĉi laŭnatura revolucio okazojn, vi por agi bone kaj mi por ami vin.

Tiam li ĉirkaŭprenis mian kolon; mi genufleksis apud la lito kaj tiel ni restis longe. Fine li konsentis trinki kelkajn gutojn da vino, kaj li sentis sin refortiĝinta.

— Ne maltrankviliĝu tro multe pro tio, kio ĵus fariĝis, diris li kviete, post kelkaj momentoj. Mi kulpigas pri tio mian kapricon gustumi iom da via fromaĝo. Mi estus devinta antaŭpensi — ĉar la lakto estas al mi nekonvena — ke tio ĉi ankoraŭ malpli konvenos. Nun la krizo estas pasinta kaj mi sentas, ke la dormo venas. Tiu ĉi bonfara

dormemo estas tiel agrabla, kiel la antaŭsentoj de l' sveno estis doloraj.

Efektive, mia avo baldaŭ ekdormis; mi kelkan tempon maldormis apud li, kaj vidante lin tiel dolĉe ripozantan mi dankis Dion kaj ankaŭ ripoziĝis.

Hodiaŭ mi estis tre okupita per zorgoj de l' mastrumado. Laŭ rimarko de avo, ke nia tolaĵo, niaj ŝtrumpoj bezonas esti lavataj, mi petis lin resti en lito, kaj mi faris lesivon, almenaŭ tiel bone kiel oni povas fari sen sapo. Li direktadis min en mia laboro. Sufiĉe granda tuko, kiun ni uzas kiel tablotukon, ebligis nin apartigi la cindrojn de la lavotaj aĵoj. Ligna kuveto estis mia lavujo. Mi poste metis la mizerajn tolaĵojn en varman akvon kaj vespere ĉio estis preta por sekiĝi ĉirkaŭ la fajro. Mi nun lasos ĉion en ĉi tiu stato ĝis morgaŭ. Kelkaj fajraj karboj kiuj restas, la varmo de l' fajrujo kaj la aerfluo plenumos la sekigadon.

Mi forgesis diri, ke vidinte mian avon, kiu frotis sian korpon kaj siajn membrojn, mi petis lin akcepti ankoraŭ por tio miajn servojn. Dum unu horo mi frotadis lin per peco da lana litkovrilo, kiun ni dediĉis por tio. Li estas konvinkita, ke nenio estas pli taŭga por vigligi la sang-cirkuladon kaj anstataŭi la movadon en libera aero, kiu mankas al li.

Ho ve! mi trovis lian kompatindan korpon en doloriga stato de malgraseco. Dum mi faris al li tiun malgrandan servon, li ne ĉesis danki min.

— Estas al mi, kvazaŭ vi redonus al mi la vivon, diris li. Mi sentas, ke dolĉa varmo renaskiĝas en miaj membroj, mi spiras pli libere.

Ĉiuj tiuj paroloj pligrandigis mian fervoron. Ĉar li maltrankviliĝis pro mia peno, mi diris ridetante: — Ĉu vi do ne vidas, ke mi mem havas el tio bonegan movadon? Mi certigas vin, ke flegado al vi ankaŭ utilas al mi, kaj mi petas vin ofte uzi kuracadon tiel utilan por la kuracisto.

La malsanulo dolĉe ripoziĝas proksime de mi, kaj dume mi riĉe kompensis mian hieraŭan silenton skribante hodiaŭ la historion de du tagoj.

5an de Januaro.

Mia avo parolis hodiaŭ matene pri sia sanstato kaŝante nenion. Ĉiuj liaj paroloj ankoraŭ sonas en mia orelo. Kia dolĉeco kaj kia saĝeco! Mi estus nepardonebla se mi ne profitus de tio, kiel ajn juna mi estas.

— Mia infano, parolis li, post kiam li invitis min sidiĝi apud lia kuŝejo, mi jam ne povas havi iluziojn, la fino de mia vivo ne estas malproksima. Ĉu ni sukcesos enkateni mian animon al tiu ĉi polvo sufiĉe longe, por ke mi vidu la tagon de via liberiĝo? Mi nescias sed mi apenaŭ kuraĝas esperi; mia malfortiĝo kreskas kun rapideco, kiu mirigas min kaj estas supozeble, ke mi lasos vin fini sola ĉi tiun malgajan vintran periodon.

„Vi estos, mi ne dubas, pli malfeliĉa pro nia disiĝo ol timigita de via soleco, kaj vi sentos pli da doloro ol da timo; sed mi sufiĉe fidas al via kuraĝo kaj pieco por esti certa, ke vi ne falos en kulpan senkuraĝecon; vi rememoros vian patron, kiun vi sendube revidos, kaj tiu ĉi penso subtenos vin. Vi spertos baldaŭ, ke la danĝeroj, kiujn vi eble renkontos tie ĉi ne estos pligravigitaj post mia morto. Kontraŭe, mi estis fakte malhelpaĵo por vi; vi ne plu bezonos timi la malsaton kaj eble, kiam vi devos forlasi la monton estos al vi pli facile. Mi nur admonas vin havi paciencon. Ne elmetu vin tro frue al la danĝero. Kelkaj tagoj pli aŭ malpli ne estas kalkulindaj en tiel longa kaptiteco, kaj vi ĉion riskus volante trofruigi la foriron.

„Kiun motivon vi havus tiel rapidi? Ĝis hodiaŭ via bonfarto ne suferis pro la enfermiteco. Vi ja ne havos niajn interparolojn por vin distri, sed kiom da malliberuloj estas kondamnitaj al silento dum longedaŭraj jaroj! Plie ilia konscienco estas ankaŭ ofte turmentita de riproĉoj, dum vi estos subtenata de la konsola rememoro, ke vi plenumis vian devon. Unu sola afero maltrankviligas min, mia kara Ludoviko; se mi devas ĝin diri, mi timas, ke mia morto impresos vian fantazion. Kiam vi vidos mian senvivan korpon, ĝi vekos en vi senton de teruro kaj eble de abomeno; tia sento estas tute senkaŭza sed multaj personoj ne scias ĝin subpremi.

„Kial do vi timus la korpan restaĵon de via maljuna amiko? Ĉu vi timas min, kiam mi dormas? Antaŭhieraŭ, kiam mi svenis, vi ne kredis min kapabla fari al vi ian malbonon, vi nur vidis la necesecon helpi min kaj vi plenumis vian devon, kiel kuraĝa viro. Nu! se vi vidos min fali en tiun lastan svenon, kiun oni nomas morto, agu kun la sama saĝeco. Mia korpo atendos de vi nur unu lastan servon; kuraĝu fari ĝin, kiam la naturo avertos vin, ke estas la momento por tio. Viaj fortoj sufiĉos; vi ĝin pruvis antaŭhieraŭ, kiam vi portis min sur la liton.

„Vi vidas tiun pordon, ĝi kondukas al la laktejo, kien ni neniam eniras ĉar ni ne bezonas ĝin; tie vi faros foson, kiel eble plej profundan por enmeti mian korpon atendante, ke vi venu por ĝin forpreni en la printempo, kaj faru regulan enterigon en nia vilaĝa tombejo.

„Post tiuj malĝojaj momentoj vi sentos vin tre izolita en tiu ĉi loĝejo; vi verŝos multajn larmojn; vi eble vokos min, kaj mi ne respondos. Ne perdu vin en senutilaj bedaŭroj; nur turnu vin al tiu, kiu ĉiam respondas, kiam ni alvokas lin kun konfido. Neniam vi pli bone komprenos, kion valoras lia helpo; ĉio mankos al vi, sed li anstataŭos ĉion.“

Jen estas la admonoj, kiujn mia avo faris al mi hodiaŭ matene, kaj kvazaŭ li sentus sin senŝarĝigita pro tio, li estis poste pli trankvila, pli serena kaj preskaŭ ĝoja. Mi mem ne povas imagi, ke spirito tiel libera kaj firma,

loĝas en tre baldaŭ dissolviĝonta korpo. Mi estas atentigita pri la danĝero, kaj ĝi ŝajnas al mi ankoraŭ malproksima. Dio volu konfirmi miajn favorajn antaŭsentojn!

6an de Januaro.

Ankoraŭ unu tago finita! Tion ni ripetas ĉiun vesperon. Mi havas ĉiam pli da motivoj por senpacienciĝi, kaj ŝajnas al mi, ke la printempo, neniam venos. Ĉu estas la timo de l' soleco, pripentrita al mi de mia avo, kiu kaŭzas mian maltrankvilon? Mi penas forigi tiujn malkuraĝajn sentojn; mi ne volas plu pensi pri mi. Ho! se mi deziregas la resaniĝon de mia avo, tio ne estas pro mia propra bono aŭ por ŝpari al mi la abomenon de l' izoleco!

7an de Januaro.

La mallumo estas pli malgaja por la malsanuloj; oni eĉ diras, ke ĝi povas malutili al la plej bona saneco. La lumo estas farita por la homo, kaj la homo por la lumo. Ni ekpensis hodiaŭ matene sistemon por ŝpari nian oleon, ne restante tute en la mallumo. Ni fabrikis lumigileton per maldika tranĉaĵo da korka ŝtopilo, al kiu ni fiksis meĉeton. Tiu ĉi malforta heleco sufiĉas por mia laboro, kaj ĝi iom gajigas mian avon. Ni ĝin uzos estonte kaj malofte eklumigos la lampon, ĉar mi ekvidas nun, ke estas al mi eble, se necese, skribi sen ĝi.

Sendube personoj kutimintaj al lumigado eĉ de plej mizera budo dum la vintraj vesperoj,

trovus nian loĝejon tre malluma sed post la nigra nokto, en kiu ni vivas de tiom da tempo ŝajnas al ni dolĉe videti unu la alian, iradi ne ĉiam palpe-marŝante kaj fine ekkoni per tiu malforta lumeto la tagon post la nokto.

Tavolo da oleo naĝas en glaso da akvo, plenigita tri-kvarone, kaj sur ĉi tiu oleo brilas nia suneto. Ni metis ĝin sur la tablon kaj, dank' al ĝia heleco ni povas iomete distingi la objektojn en nia kuirejo. Tiu ĉi duonlumo simila al la unua klareco de l' tagiĝo forigas la malgajecon; ĝi memorigas tiujn preĝejojn, kie ĉiam brulas lampo por instigi al preĝado. Mi rimarkas ĉiujn agojn de mia aveto; ofte mi vidas lin plekti la manojn, levi la okulojn aŭ turni ilin al mi. Ha! tiam mi divenas lian penson, kaj senparole ni kune faras la saman deziron.

10an de Januaro.

Mia Dio, vi ordonis ĝin!.... Mi estas sola kun vi, for de la tuta mondo! Estis autaŭhieraŭ.... Neeble estas al mi daŭrigi kaj skribi pri tiu morto. Mia papero estas malseka de miaj ploroj.

12an de Januaro.

Jes, estas fakte hodiaŭ la 12a de Januaro; du tagoj pasis, de kiam mi skribis la lastajn liniojn... La prudento revenas, ĝi venkos, se plaĉas al Dio. Se mi ne sentus, ke Dio estas proksime de mi, mi ankaŭ mortus, pro mia timego.

13an kaj 14an de Januaro.

La 7an mi kuŝiĝis kun plena espero; mia avo ŝajnis al mi en pli bona stato ol ordinare, sed antaŭ ol mi ekdormis, mi aŭdis lin ĝemi kaj mi leviĝis subite. Ne atendante, ke li voku min por helpo, mi vestis min, mi ekbruligis la lumileton, kiu estis tute preta kaj mi demandis la malsanulon, kion li sentas.

— Svenemon, diris li; estos kiel la alia tago, aŭ eble...

Tie ĉi li haltis.

— Ĉu vi volas trinki kuleron da vino, mia kara aveto?

— Ne, infano mia, nur malsekigu iom miajn tempiojn kaj frotu miajn manojn kun vinagro... kaj... prenu la Imitadon. Legu, infano, en tiu loko, kiun vi scias... kie mi metis la signon.

Mi obeis, kaj frotinte liajn manojn kaj tempiojn kun vinagro, mi lumigis la lampon por pli bone vidi; mi genuis kaj legis tremante la montritan paĝon.

Ĝi estis en la libro IVa, la komenco de l' ĉapitro IXa: „Sinjoro, ĉio, kion entenas la ĉielo kaj la tero apartenas al vi. Mi volas oferi min al vi kaj eterne resti kun vi" — ĝis tiuj ĉi vortoj: „Mi oferas al vi ĉiun bonon, kiu estas en mi, kvankam ĝi estas tre mizera kaj neperfekta, por ke plaĉu al vi ĝin plibonigi kaj sanktigi, kaj por ke vi konduku min al bona kaj feliĉa fino, kvankam mi estas maldiligenta, senutila kaj malinda homo."

Kiam mi alvenis al tiu ĉi loko, li haltigis min, igis min proksimiĝi, prenis miajn manojn en siajn kaj faris preĝon, kies vortojn mi nun kiel eble plej fidele transskribos:

„Sinjoro, en la momento kiam mi tuj aperos antaŭ vi, mi devus nur pensi pri mia savo, kaj tremi atendante vian juĝon; pardonu ke mi ne povas forigi de mia penso alian kaŭzon de maltrankvilo! Vi revokas min al vi, kaj mi nun lasos en soleco ĉi tiun karan infanon! Disiginte lin de lia patro, mi mem baldaŭ forlasos lin!

„Mi tremas pensante pri ĉio, kion li suferos; precipe mi timas, ke lia kredo malfortiĝu, kaj ke li perdu sian konfidon al vi. Vi aŭdas min, Sinjoro; elaŭskultu min!

„Ho ve! mi esperis malsupreniri kun li de la monto kaj revidi niajn arbarojn kaj kampojn; tion vi ne permesis, sed vi permesos ke mia nepo revidu ilin. Inspiru al li por tio la necesajn firmecon kaj singardemon! Ke li estu post mia morto, kiel li estis dum mia vivo: atenta, persista, kuraĝa!

„Se li devas esti redonata al sia patro, mi ĝojas pri mia sorto, ĉar mi sentas, ke la elprovo al kiu vi elmetis lin per mi estos por li benita; li neniam forgesos la impresojn, kiujn li ricevis en tiu ĉi domo.“

Tiel estis proksimume liaj paroloj. Li eldiris ilin malrapide kaj per malforta voĉo kaj post sufiĉe longaj intertempoj; poste li petis min diri la preĝojn, kiujn mi scias parkere; li mem retrovis en sia memoro

sentencojn el la Biblio aŭ parolojn de l' Savinto kaj ripetis ilin kun fervoro kaj rezignacio, kiuj kortuŝis min ĝis larmoj.

Mi aldonas okazintaĵon tre malgrandan, sed kiu pligrandigis ankoraŭ mian emocion; Blankineto, eble surprizita vidi lumon en tiel neordinara horo, komencis blekadi persiste.

— Kompatinda Blankineto! diris la mortanto; mi volas ŝin karesi ankoraŭ unu fojon. Malligu ŝin, infano mia, kaj alkonduku ŝin al mi.

Mi faris tion, kion li deziras, kaj Blankineto, laŭ sia familiara kutimo, metis sur la randon de l' lito siajn antaŭajn piedojn serĉante ian manĝaĵeton. Ni kutimigis ŝin tiel ricevi el nia mano kelkajn salerojn. Mi pensis bone fari metante iom da salo en la manon de l' malsanulo; Blankineto tuj kaptis ĝin kaj longe lekis la manon.

— Estu ĉiam bona nutristino! diris li, karesante kun peno ŝian kolon, kaj li turnis la kapon; mi rekondukis Blankineton al ŝia manĝujo.

Poste, la mortanto, diris nur malmultajn sinsekvajn parolojn; nur li komprenigis min, ke li deziras ke mi restu apud li, kun mia mano en la lia; de tempo al tempo mi sentis malfortan premon kaj ĉar lia rigardo parolis mem, mi pensis, ke li kunigas siajn lastajn fortojn por montri al mi sian amon, kaj ke li ĉesos pensi pri mi nur ĉesante vivi.

Mi diris al li kelkajn amikajn parolojn; tiam, liaj okuloj reviviĝis, kaj mi vidis ke mi

ĝojigus lin daŭrigante. Mi do kliniĝis al li kaj parolis per voĉo tiel firma, kiel mi povis:

— Adiaŭ, adiaŭ! ĝis la revido en ĉielo! Mi penados sekvi fidele viajn instruojn, por atingi tiel belan rekompencon. Mi kredas al Dio, nia Patro; ne havu timon pri mi; vi tiel bone preparis min, ke nun Dio sola estas al mi necesa.

Tie ĉi mia kara aveto pli vive premis mian manon; penante respondi, sed vane; li povis nur esprimi per ĝemo sian ĝojon.

— Mi rememoros, aldiris mi, ĉiujn viajn konsilojn por konservi mian vivon. Pro amo al vi, mi malzorgos nenion, kio povas subteni ĝin kaj fortiri min el tiu ĉi loko. Adiaŭ, mia kara avo! Ho ve! — En la ĉielo vi trovos mian patrinon kaj eble mian patron; diru al ili ke mi penos ĉiam sekvi ilian ekzemplon kaj la vian. Adiaŭ! adiaŭ!

Mi sentis ankoraŭ malfortan manpremon; ĝi estis la lasta. Lia mano, kiu iom post iom malvarmiĝis, faligis la mian; li ekdormis por ĉiam sen peno, sen doloro, eĉ ne aŭdigante ĝemon.

Miaj plej teruraj momentoj, poste, ne estis la unuaj. Estis nur kiam mi rigardis interne, en mi mem kaj kiam mi vidis min sola en tiu malgaja loĝejo apud....kadavro; tiam mi sentis nevenkeblan tremon de teruro, precipe kiam noktiĝis.

Dum la mateno mi havis sufiĉe da memregado por streĉi la horloĝon kaj por melki Blankineton, la malvarmo devigis min ekbruligi fajron, tio okupadis min; sed poste mi

falis en malgajegan senkuraĝecon. Malfeliĉe vespere ekblovis vento sufiĉe forta, kaj mi ree aŭdis tiujn funebrajn ĝemojn al kiuj mi ne plu estis kutiminta.

Mi sidis apud la fajro, maldormante ĉe la malgaja heleco de la lumigileto kaj turnante la dorson al la lito; iom post iom mi sentis, ke frosttremo ekkaptas min; mi jam ne estis majstro de miaj pensoj, mia konfuziga timemo estus povinta kreski kaj fariĝi pereiga por mi, se mi ne estus elpensinta por ĝin ĉesigi, rimedon, kiu unuavide povus ŝajni taŭga por pligrandigi la timon. Mi proksimiĝis al la korpo, unue malvole kaj poste kun pli da decideco, mi rigardis ĝin, mi kuraĝis ĝin palpi. Estis malfacila momento, tamen mi persistis, mi kelkafoje refaris same kaj mi rimarkis, ke mia teruro malgrandiĝis pli kaj pli.

De tiam mi ne ĉesis, post mallongaj intertempoj, reveni al tiu malvivaĵo; mi prizorgis ĝin kiel la personoj kutimintaj al tiaj zorgoj faras kun tiom da memregado. La esprimo de l' vizaĝo estis tiel dolĉa kaj kvieta, ke mi ne povis reteni miajn larmojn rigardante ĝin.

— Ne, diris mi ploregante, la senviva korpo de mia kara aveto ne terurigas min.

Tamen miaj angoroj rekomencis, ĉe la alveno de l' dormo; en mia aĝo la dormemo estas nevenkebla. Ĉu mi kuŝiĝos apud la kadavro? Mia decideco ne iris ĝis tie, kaj mi serĉis kontraŭ la superstiĉa timo tre mizeran helpaĵon, mi devas konfesi; mi rifuĝiĝis proksime de Blankineto. La varmeco kaj

moveco de l' vivo, kiun mi trovis ĉe tiu ĉi kara besto, la brueto, kiun ŝi faras remaĉante, redonis al mi iom da trankvilo.

Sed kial, estinginte la lumigilon, mi rekomencis tremadi je ĉiuj membroj? Kia mizera, malforta infano mi estas! Kian helpon mi trovis en tiu tremanta lumeto? Mia blovo ĝin estingas, mia mano reeklumigas ĝin, ĝia vivo dependas de mia volo; kaj mi alligis mian trankvilecon al tiu flameto!

Fine la Plejpotenco, kiun mi fervore alvokis havis kompaton al mi; ĝi kvietigis min, kaj mi profunde ekdormis.

La morgaŭan tagon, tuj de la vekiĝo, mi rekomencis miajn batalojn de l' antaŭtago; mi okupiĝis kiel eble plej multe pri la kaprino kaj pri mia mastrumado kaj precipe mi proksimiĝis ofte al la korpo; mi eĉ tenis sufiĉe longe en miaj manoj tiun karan kaj respektegindan kapon. Ju pli mia terurego malkreskadis, des pli grandiĝadis mia malĝojo, sed tiel racia kaj natura aliiĝo en miaj sentoj kontentigis min.

Miaj pensoj tiam turnis sin al la zorgoj pri la enterigo, kaj mi rememoris tion, kion mia avo diris al mi. Mi antaŭvidis malfacilaĵojn, kiuj ekstreme embarasis min. Cetere mi, en la nuna momento, forpelis ĉiujn tiujn ideojn. Mia avo parolis, kredeble kun sekreta intenco, pri la danĝero de trofruaj enterigoj; mi do decidis atendi ĝis la naturo devigos min plenumi tiun lastan devon. La viva amo, kiun mi havis al mia kara aveto, malhelpis min cedi

al la malkuraĝa deziro forigi, kiel eble plej baldaŭ tiel terurigan vidaĵon.

La momento, kiam mi vespere devis reiri al la dormado estis preskaŭ tiel malfacila, kiel la antaŭtago. Mi ekpensis, por redoni al mi iom da firmeco, ke mi devas trinki kelkajn gutojn da tiu vino, nur tromulte ŝparita de l' mortinto.

Enverŝinte en la glason la kvanton, kiu ŝajnis al mi sufiĉa, mi estis kaptita de dolora korpremo. — Senutila helpo! diris mi, kaj mi rememoris kun kiom da plezuro mi vidis mian karan aveton, gustumi ĝin la unuan fojon. La manko de kutimo kaj mia ekstrema bezono plifortiĝi post tiom da malfeliĉoj, igis ke la vino favore efikis, kaj mi havis bonan nokton.

La 10an de Januaro mi provis skribi mian taglibron, sed estis al mi neeble daŭrigi; tamen, tiun tagon mia spirita stato estis multe pli kontentiga. La preĝo redonis al mi kuraĝon, mia fantazio kvietiĝis pli kaj pli kaj, kiel antaŭdiris mia avo, la bedaŭroj anstataŭis la timon.

Kiom da larmoj mi verŝis sur vian korpon, mia respekteginda amiko! Tamen mi jam vidis en ĝi la terurigajn postsignojn de la morto. Miaj sentoj estus ribelintaj, se mia koro ne estus estinta tiel okupita. Vane mi konstatis, ke la entombigo fariĝis urĝa, mi pensis nur pri la rimedoj konservi kiel eble plej longe tiujn amatajn restaĵojn. Fine mi rememoris la dian volon, tiel klare esprimitan per tiuj ĉi vortoj:

„La korpo reiras al la tero, el kiu ĝi estis eltirita.“

Mi prenis miajn ilojn kaj malfermis la pordon de la laktejo.

— Nu, pensis mi, mi havas ĉiujn oficojn! Estinte malsanula flegisto kaj kuracisto, mi nun estas tombfosisto! Mi mem faros tion, kion la parencoj evitas eĉ vidi!

La unuaj pioĉbatoj estis al mi abomenaj, mi devis halti. Ne la brakoj rifuzis agi, estis mia spirito, kiu fariĝis malklara kaj mi perdis la necesan energion. Ĉiun fojon, kiam mi frapis la teron, laŭta eĥo respondis de la ŝtona arkaĵo. Mi devis kutimi al tiu bruo kaj mi dediĉis la tutan tagon por laboro, kiu ne devus postuli pli ol du horojn.

Efektive la tero estis tie sableca kaj malpeza kaj fine mi povis ĝin elfosi per la ŝovelilo ne bezonante ĝin pioĉi antaŭe. Mi profitis je tiu facileco por fosi tre profunde, ĉar mi pensis, se la domo devas esti forlasita kelkan tempon, ĉu pro tio ke mi elirus, ĉu ke mi ankaŭ mortus, mi devas fari mian eblon por ke la korpo estu ekster la atingo de l' sovaĝaj bestoj. Cetere la higieno ja postulis sufiĉe profundan enterigon, por ke neniu odoro eliĝu. Mi do daŭrigis mian funebran laboron ĝis kiam mi estis tute kaŝita en la fosaĵo.

La horloĝo eksonoris la dekan horon. La nokto estis veninta kaj la nigraj pensoj kun ĝi; ĉar kvankam mi vidis nenion ekstere, la ideo ke la mallumo regis tie igis min senti eĉ en la domo la malgajajn impresojn de l' nokto.

Mi ne kuraĝis fini la enterigon, kvankam ĝi fariĝis urĝa. Mi havis la ideon, por forigi la eliĝintan odoron, bruli fojnon kaj vaporigi vinagron; sed la kaprino suferis pro tio. Ŝiaj ternoj avertis min, ke zorgante por mi, mi igis ŝin suferi kaj mi ĉesis.

La laciganta laboro, kiun mi estis farinta, helpis min baldaŭ retrovi la dormon. Ĝi estis interrompita nur kelkajn momentojn per la karesoj de Blankineto, kiu ŝajnas tute kontenta havi min tiel proksime de si kaj kiu ne rifuzas utili al mi kiel kapkuseno.

La 11an de Januaro, mia unua penso vekiĝante estis fini mian malĝojegan taskon kaj, lumiginte la lampon, mi sentis, ke mia kuraĝo malgrandiĝas. Mi ree bezonis rimedojn, kiujn mi ne estus devinta uzi; anstataŭ matenmanĝi kiel kutime kun varma lakto kaj terpomoj, mi prenis iom da vino kaj da pano. Ĉi tiu nutraĵo redonis al mi iom da firmeco, kiun mi ne ŝuldis al mia karaktero, sed je kiu mi profitis senprokraste. Mi antaŭe estis pripensinta pri la maniero, kiel mi plenumos la enterigon, kaj mi preparis ĉion la antaŭtagon. Mi metis sur du seĝojn proksime de l' lito sufiĉe longan kaj larĝan tabulon, ĝuste tiun al kies falo mi dankas la retrovon de l' „Imitado". Poste mi suriris sur la liton kaj pasiginte ŝnuron sub la supra parto de l' korpo, mi prosperis streĉante miajn fortojn ŝovi ĝin sur la tabulon. Facile estis al mi poste ŝovi sammaniere la malsupran parton. Mi ligis la korpon sur la tabulon kaj, kiam mi

ĝin tiel vidis kun plektitaj manoj sur la brusto, lasanta sin movi laŭ mia volo, kaj klinanta la kapon flanke, mi ekploregis kaj kriis:

— Ho, aveto mia!... Vi forlasas min! Vi ne plu aŭdas min! Vi ne plu volas respondi al mi!

Mi ne memoras ĉiujn aliajn sensaĝajn parolojn, kiujn mi diris al tiu malviva estaĵo, en mia spirita konfuzeco. Ĝi eble estus daŭrinta pli longe, se mi estus havinta konsolanton apud mi; ĉio kion oni estus dirinta povus nur akrigi kaj daŭrigi mian doloron; sed kiam mi vidis tiun malvarman kadavron sensenta por miaj plendoj kaj agoj, ĝia senmoveco baldaŭ redonis al mi la trankvilecon, kiun mi bezonis.

Mi estis preparinta du lignajn rulojn, mi lokigis ilin konvene kaj fortirante zorgeme la seĝon, kiu subtenis la malsupron de l' korpo, mi mallevigis ĝis tero la antaŭan finon de la tabulo. Malgraŭ ĉiuj penadoj, mi ne tiel bone sukcesis ĉe la alia fino kaj la falo de l' korpo estis sufiĉe forta por kaŭzi al mi kortremon, kiu devigis min halti denove.

Mia kara avo, kiam vi instruis min, antaŭ nia domo, kiel oni veturigas sur du ruloj pezan ŝarĝon, ni ne pensis, ke mi utiligos viajn lecionojn en tiel malgaja okazo. Rememoro pri tio, kion vi tiam diris al mi vive ekstariĝis en mia fantazio; ŝajnis al mi, ke mi ankoraŭ aŭdas vin, kaj kiam ekpuŝo movis la kapon, kvazaŭ ĝi farus signojn de aprobo, mi estis kaptita de tia emocio, ke mi deturnis la

okulojn, kiel faras, pro timo je kapturniĝo, la personoj kiuj marŝas sur la rando de abismo.

Mi estis ebeniginta la vojon; baldaŭ estis la korpo proksime de la fosaĵo. Facile estus faligi ĝin malsupren, sed mi ne povis decidiĝi agi kun tiel malmulte da zorgeco. Du tabuletoj metitaj laŭlarĝe, subtenis ĝin super la kavaĵo. Mi fortiris tiun, kiu portis la piedojn, kaj la korpo troviĝis en oblikva situacio, post falo, kiun mi ne sciis moderigi. Ŝnuro, kiun mi alligis sub la ŝultroj, post kiam mi fortike fiksis unu finon al paliso, ebligis min malrapide malsuprenigi la korpon ĝis ĝia ripoza loko.

Ĉiuj malfacilaĵoj estis venkitaj; ĉio kio restis por fari kaŭzis al mi nenian timon rilate al la plenumo, mi povis libere ellasi mian doloron. Sidante sur la amasigita tero, mi longe ploris apud tiu malfermita fosaĵo. Mi ne kuraĝis ĵeti la unuajn ŝovelilojn da tero.

Antaŭ ol plenumi tiun malgajan devon, mi diris al mi, ke mi volas plenumi kiel eble plej bone tiun de l' pastro.

Tuj mi genuis kaj serĉis en mia memoro ĉiujn konatajn de mi preĝojn kaj sentencojn, konvenajn por tiu ceremonio. Mi prenis la „Imitadon", mi ĝin konis sufiĉe bone por ke mi ne bezonu serĉi longe lokojn taŭgajn por la tiama momento.

Ho mia karega avo, nun mi sola bezonis konsolon kaj kun rava ĝojo mi legis antaŭ viaj mortintaj restaĵoj, la ĉapitron pri „la justulo kaj pacemulo" kaj tiun pri „la korpureco kaj la simpleco de intencoj". Tiom

da trajtoj povis konveni al vi, ke ŝajne la aŭtoro pripentris vin.

„Komence, tiel li diras, ekhavu la pacon en vi mem, kaj poste vi povos havigi ĝin al la aliaj.“

— Estas tio kion vi faris, justa kaj bona viro, kaj via paco fariĝis la mia.

„La pacemulo faras al sia proksimulo pli da servoj ol la scienculo“, diris la „Imitado“.

— Mi ne povas imagi, ho amiko mia, tion, kio mankis al via scio, kvankam vi centfoje parolis pri via nescio; sed vi estis tiel bonvola kaj dolĉa, ke vi vekis en mi fervoran deziron pruvi al vi mian amon per mia submetiĝo kaj montri mian obeemon per miaj progresoj.

„Se vi estus pura kaj bona interne, tiel parolas la libro, vi vidus sennube kaj vi komprenus ĉion. Pura koro trapenetras ĉielon kaj inferon. Ĉiu homo juĝas la eksterajn aferojn laŭ siaj internaj inklinoj.“

— Vi estis bona kaj pura, mia avo, kaj sekve vi legis en mia koro pli facile kaj pli klare ol mi mem. Vi sendube trovis min ofte tre riproĉinda kaj tamen via pardonemo superis ankoraŭ vian sagacecon; kvankam vi konis min, vi ne ĉesis min ami.

Jen kiel mi parolis al li kun amo. Ŝajnis al mi, ke parolante laŭte mi eliradis el mia soleco. La libro respondis al mi kaj daŭrigis mian emocion. Fine la lacego haltigis min; mi revenis al la realeco kaj ne prokrastis tion, kio restis por fari. La fosaĵo estis plenigita post mallonga tempo. Mi pasigis la reston

de l' tago engravurante per la pinto de mia tranĉilo sur tabuleto el acera ligno la sekvantan surskribon:

Tie ĉi ripozas la korpo de Petro-Ludoviko **Lopraz**, mortinta dum la nokto de la 7a al la 8a de Januaro 18..., en la brakoj de sia nepo Ludoviko Lopraz, kiu mem enterigis lin.

Mi alnajlis la tabulon sur palison, kiun mi plantis sur la tombon; farinte tion, mi fermis la pordon kaj mi revenis en tiun ĉi kuirejon, kie mi ne havis plu alian kunulon ol Blankineton.

Tamen, kvankam mi sentis min pli bone post kiam la kadavro ne plu kuŝis sur la lito, mi ja vidis, ke mi ankoraŭ ne estis venkinta mian tutan malfortecon. Mi decidis ĝin kontraŭbatali. Mi estis tuj ŝlosinta la pordon de la laktejo, mi malŝlosis ĝin kaj fermis nur per la riglilo. Ankaŭ mi faris al mi mem la promeson fari al la tombo oftajn vizitojn, kaj ĉiam sen lumo. Mi komencis antaŭ du tagoj, tie mi preĝas matene kaj vespere.

La antaŭhieraŭa tago ŝajnis al mi malplena kaj laciga. La urĝaj taskoj, kiuj okupadis min ĝis tiam ne postulis plu mian atenton, kaj kontraŭ mi mem mi devis batali. Mi serĉis en la laboro distraĵon, kiun mi ne povis trovi; la samaj pensoj konstante persekutis min kaj mi ne prosperis eliĝi el mi mem. Vespere mi provis skribi, kaj ankaŭ tiufoje estis neeble.

Hieraŭ, kiu estis la 13a, mi havis la ideon relegi mian taglibron de la unua paĝo. Oni senpene komprenos, ke tiu legado vive kortuŝis min, sed mi devas diri, ke ĝi ankaŭ faris al mi bonon, memorigante al mi kun nova forto la instruojn kaj virtojn de mia avo. Tuj kiam mi finis, mi eksentis la bezonon ellasi mian doloron en tiun ĉi memorigilon, komencitan laŭ liaj konsiloj. Fine mi dediĉis la hieraŭan kaj la hodiaŭan tagojn por raporti pri la doloraj okazintaĵoj, kiuj tiel malĝojege ŝanĝis mian sorton.

15an de Januaro.

Jes, mia sorto estas tute ŝanĝita; mi rimarkas ĝin ĉiun tagon pli. Ĉu vere? Mi posedis amikon, kaj mi kuraĝis plendi! Mi komparis mian situacion kun tiu, kiun mi perdis. Kiom mi nun bedaŭras la staton, kiu ŝajnis al mi plorinda! Dio punas min pro tio, ke mi estis malkontenta. Mi estas sola! mi estas sola! ĉi tiu penso persekutis min la tutan tagon.

16an de Januaro.

Mi pasigis la tagon en la sama spirita stato. Jam de la mateno mi sentis min malvigla kaj senkuraĝa; kaj mi estus irinta en liton tiel senkonsole, kiel hieraŭ vespere, sen cirkonstanco, kiun mi ne devas konsideri kiel miraklon, ĉar ĝi estas tute natura sed, kiu frapis min kvazaŭ averto de l' antaŭvideco.

Mi ĵus finis mian silentan vesperon kaj estingis la fajron kaj ankaŭ volis estingi la lumigilon, kiam mi aŭdis malfortan bruon en la kameno. Estis rubo, kiu falis kun fulgo; la fulgo ekbruliĝis, ĝi eligis iom da odoro kaj mi kliniĝis sub la tubon por vidi ĝian staton kaj certiĝi pri mia sendanĝereco. Dum mi per streĉita kapo vane serĉis kontraŭ la muroj, postsignojn de l' fajro, brila stelo montriĝis ĉe la rando de l' fera kamentubo, kaj mi vidis ĝin malrapide trapasi.

Ĉi tiu aperaĵo daŭris nur momenton, tamen ĝi sufiĉis por kaŭzi al mi vivan emocion.

Unu el la sunoj, kiujn la Kreinto dissemis en la spaco briligas do ĝis mi siajn radiojn kaj vizitas min en la fundo de mia tombo! Ĝi parolas al mi pri la potenco de mia Dio! Ĝi instigas min al adorado kaj espero! Mi respondis al tiu voko, mi falis genue kaj la unuan fojon post multaj tagoj mi retrovis en mia animo tiun fervoron, kiun la lecionoj de mia avo vekis en ĝi.

17an de Januaro.

Kiel malfacile estas konservi kaj subteni la sanajn impresojn naskitajn en ni de bona impulso! Mi kuŝiĝis plena de ĝojo, kaj mi leviĝis pli senkuraĝa ol iam ajn. Mi rememoris proksimume la horon, kiam mi vidis la stelon, kaj mi esperis revidi ĝin hodiaŭ; sed ĉu pro tio ke ĝi trairis alian vojon, kion mi ne scias, ĉu pro tio, ke la ĉielo estis kovrita, mi ne vidis ĝin.

18an de Januaro.

Dum mia animo vane serĉas la perditan nutraĵon, mi estas rilate al la korpo sufiĉege provizita de riĉaĵoj, kiuj ne povas ĝojigi min sed kiuj devas min trankviligi. La porcio da lakto de Blankineto, kiun mi ne trinkas, permesas al mi fari ĉiutage fromaĝeton. Mi tion faras malpli multe pro singardemo ol por distri min. Mi ne kutimas al la soleco; vane mi penadas por venigi kaj daŭrigi la dormon, ŝajnas al mi ke la tagoj ne havas finon.

19an de Januaro.

Mi skribas por skribi. Per kio mi plenigus tiun ĉi taglibron? Se ĝi devas resti vera, ĝi estos terure malgaja. Mi klopodas preni la plumon kiel antaŭe kaj iom vivigi mian spiriton; senutile! mi ne povas venki tiun spiritan rigidecon.

20an de Januaro.

Ĉi tiu peniga sento estas la plej kruela, kiun mi konas. Mia unua konfuziĝo kiam ni fariĝis malliberaj, mia timego kiam la lupoj volis ataki nin, la funebraj scenoj de la morto kaj de la entombigo de mia avo, ne suferigis min tiel multe, kiel la nuna korpremo. Ĝi estas la enuo! Mi ne konis tiun turmenton, de kiu eĉ la preĝo ne povas min liberigi.

21an de Januaro.

Dume dum la kaprino ricevadas sian nutraĵon de ies mano, ŝi ne rimarkas la mal-

plenaĵojn, kiuj fariĝas ĉirkaŭ ŝi; mi sufiĉas al ŝi, kiel sufiĉus mia avo, kiel sufiĉus iu ajn persono. Ŝi bezonas min senkonscie; ŝi profitas miajn zorgojn sen dankeco; iufoje mi emas ŝin riproĉi. Kia senpripenso! oni ja ne povas nomi sendanka estaĵon, kiu ne havas inteligentecon.

Sed mi, kiu estas lumigita de tiu dia lumo, ĉu mi scias uzi ĝin por la celo, por kiu mi ĝin ricevis? Ĉu mi estas pli danka ol tiu sensaĝa besto? Ho ve! malfeliĉulo, ĉu mi nur prosperos gardi min kontraŭ la plendoj kaj la malespero?

22an de Januaro.

Mi enskribu tiun ĉi daton en mian taglibron. Ĝi ne lasos al mi alian rememoron. Kio okazis al mi?

23an de Januaro.

Preskaŭ mi pereis... per morto subita, terura, kaj mi estus estinta surprizita meze de mia kulpa apatio. Ĉu mi ankaŭ devas nomi tion ĉi miraklo? — He! ne gravas scii, kiel Dio agas; esenca afero estas, ke mi spertu la bonfaran efikon de la okazintaĵoj, kiujn li estras.

De kelkaj tagoj mi rimarkis, ke la vetero estas multe pli milda, kaj ke la fumo supreniras malpli facile; hodiaŭ ĉirkaŭ la dua posttagmeze mi aŭdis konfuzan bruon, kvazaŭ tondradon; ĝi rapide alproksimiĝis, ĝi fariĝis terura kaj subite mi eksentis fortegan skuon.

Mi eljetis krion. Kelkaj objektoj disfalis; densa polvo plenigis la kuirejon; cetere la krakado de la tegmentaj traboj avertis min, ke la domo ĵus ricevis fortegan frapon; tamen mi vidis ĉion en ordo ĉirkaŭ mi.

Mi rondiris en la aliaj partoj de la domo. Tuj kiam mi eniris en la stalon, mi vidis timigajn postsignojn de la akcidento; multe da gipso kovris la teron; la muro estis malleviĝinta kaj ĝi videble kliniĝis sed ĝi ankoraŭ staris; parto de la tegmento estis rompita ĉe la flanko de la monto. Nenio alia, kaj mi konkludis, ke la falaĵo, kiu kaŭzis la domaĝon haltiĝis kontraŭ la domo. Ĉu estis ŝtonego, kiu malligiĝis de la apudstaranta krutaĵo? Ĉu plivere ne estis lavango, kiu formiĝis supre, sekve de la plimildiĝo de la temperaturo kaj, kiu ne havante ankoraŭ sufiĉe da forto kaj da amplekso, ne povis trapasi la baron haltigantan ĝian faladon?

Mia emocio estis granda, ĝi ankoraŭ dauras; mi dankas kun fervoro la Plejpotencon pri la averto, kiun ĝi bonvolis sendi al mi; povu mia koro vekiĝi kaj ne plu ekdormi! Jes, mi rekonas ĝin, tiu ĉi nova elprovo estis al mi necesa. Mi faladis en malkuraĝan apation; mi estas feliĉe liberigita de ĝi, kaj mi dankos Dion pro tio sur la tombo de mia avo.

24an de Januaro.

Mi havas novajn motivojn por maltrankviliĝi; la kaprino donas malpli multe da lakto.

Mi nur kredis tion rimarki de kelkaj tagoj; nun mi jam ne povas dubi.

25an de Januaro.

Mia avo certe antaŭvidis la okazon, kiam mi devus resti sola tie ĉi, kaj li donis al mi kelkajn konsilojn por helpi min el embaraso. Iam li diris: „Kion ni farus se Blankineto ĉesus doni lakton? Ni nepre devus havi la kuraĝon ŝin buĉi, kaj nutri nin per ŝia viando.“ Kaj li donis al mi klarigojn pri la maniero, kiel ni devus fari por konservi la viandon.

Ĉu mi estos devigata uzi tiun kruelan rimedon?

26an de Januaro.

Se ĉio restus same kiel nun, mi ne bezonus timi. Blankineto donas al mi ankoraŭ sufiĉe da lakto por mia nutrado. Mi ne povas plu fari fromaĝojn, estas vere, sed mi havas malgrandan provizon da ili. Mi esploris, kiom da nutraĵoj restas al mi kaj mi pasigis la tagon kalkulante, kiom da tempo ili daŭrus, se mi ne havus alian manĝaĵon. Tio ne atingus du semajnojn.

27an de Januaro.

La lakto malpliiĝas kaj la kaprino grasiĝas proporcie.

Nu, en la okazo, kiam la lakto ĉesus, la malfeliĉa besto preparas sin por nutri min per sia viando.

30an de Januaro.

Unu sola ideo priokupadas min nun: ĉu mi devos submeti min al la dolora devigo fariĝi buĉisto? Ĉu mi devos, por subteni mian malgajan vivon, mortigi tiun, kiu min nutris ĝis hodiaŭ? Mi havas nur duonan porcion da lakto.

1an de Februaro.

Hieraŭ la lakto ne malmultiĝis, sed tio kostis al mi tro multe; mi donis al la kaprino trioblan porcion da salo; ŝi plimulte trinkis, tion mi rimarkis melkante ŝin. Malfeliĉe estus al mi neeble daŭrigi tiel, ĉar se mi devas mortigi mian karan Blankineton, mi bezonas la salon. Mortigi Blankineton!...

Hodiaŭ mi estis pli ŝparema kun la salo, sekve la kvanto da lakto tre malgrandiĝis.

2an de Februaro.

Oni foje diris al mi, ke la tro grasaj kokinoj faras pli malmulte da ovoj, kaj mi havis la ideon malgrandigi hodiaŭ matene la porcion da fojno, kiun mi donas al Blankineto opiniante, ke mi eble atingus bonan rezultaton. Tre malbone mi sukcesis. Pro nesufiĉa nutraĵo ŝi donis ankoraŭ malpli da lakto ol la antaŭan tagon. Plie mi havis la malĝojon aŭdi ŝin maldolĉe bleki la tutan duontagon.

3an de Februaro.

Mi faris novan sperton tiel senutilan, kiel la hieraŭa: mi volis devigi Blankineton manĝi

pajlon anstataŭ fojnon pensante, ke tia ŝanĝo en la nutrado eble havus efikon. La kaprino nur tre malfacile konsentis al tio, kion mi volis kaj ĉu pro ĉagreno ĉu pro sufero, ŝi nur donis kelkajn gutojn da lakto.

4an de Februaro.

Mi ne plu turmentos ŝin, se mi devas ŝin mortigi mi igos ŝian ekzistadon agrablan ĝis la lasta momento. Hodiaŭ ŝi ricevis riĉan porcion da manĝaĵo kaj ŝi ankaŭ estis pli bona nutristino. Sed mi ne atendas ke tio daŭru, mi lasos la naturon agi libere. Farinte mian tutan eblon por eviti tiun malfeliĉon, mi penos akcepti ĝin kun rezignacio.

7an de Februaro.

Vane mi laboris kaj preĝis, Dio ne elaŭskultas min, sed mi submetiĝis al lia volo. Ĉu decus, ke mi plendu dum mi vidas la trankvilan ĝojon de tiu kompatinda besto, kiu estos baldaŭ oferita? Ĉu la inteligenteco estus por mi helpo malpli efika ol la senprudento estas por la besto?

Jam ne penindas melki Blankineton du fojojn ĉiutage, mi atendis ĝis la vespero por ricevi iom pli da lakto per unu fojo; sed ŝi nevolonte lasas min alproksimiĝi. Mi suferigas ŝin premante la mamon, instinkto avertas ŝin, ke mi malbone agas kontraŭ ŝi; ŝi ribelas kaj rifuzas doni al mi la malmulton, kiu restas. Ho ve! se mi turmentas ŝin per miaj klopodoj

estas nur, ĉar mi dezirus eviti al ŝi sorton, kiun ŝi ne antaŭvidas.

8an de Februaro.

Mi konfesas mian malfortecon; mi verŝis larmojn hodiaŭ, penante vane melki lastan fojon Blankineton kaj peti de ŝi tion, kion ŝi donacis al mi de tiom da tempo. Kiam ŝi vidis, ke mi haltas, ŝi rigardis min malkonfide, kvazaŭ ŝi volus defendi sin kontraŭ nova provo de mi. Tiam mi forĵetis la laktujon, mi sidiĝis apud la malfeliĉa besto, mi kisis ŝin kaj ploregis.

Ŝi malgraŭ tio daŭrigis sian manĝadon, kiun ŝi intermiksis per blekoj kaj karesaj rigardoj. Oni diras, ke kaprino neniun rekonas, kaj ne havas la ĵaluzan kaj sindonan amikecon de hundo; tamen Blankineto estas afabla kontraŭ sia kunulo; ŝi konfidas al mi, ŝi atendas de mi la nutraĵon kaj la flegojn kiujn ŝi kutimis ricevi de mi.... kaj mi devos frapi ŝin per tranĉilo! Sendube mi igos ŝin suferi, ĉar mi ne havas sperton, mi vidos ŝin barakti kontraŭ miaj batoj!

Dio donis al la homo bestojn por lia nutrado, mi scias, sed ni ne ofendas lin, se ni amikiĝas, kun tiuj, kiuj estis niaj bonfarantoj, kaj al kiuj li donacis tiel allogantan dolĉecon; mi do malfruigos kiel eble plej multe la momenton de tiu kruela ofero. Restas ankoraŭ al mi nutraĵoj por kelkaj tagoj kaj mi ilin ŝparos, kiel eble plej bone.

12an de Februaro.

Estas al mi neeble akurate skribi mian taglibron meze de la angoroj en kiuj mi vivas. La nutraĵoj elĉerpiĝas kaj mi ne povas malgrandigi miajn porciojn da manĝaĵo ne elmetante mian sanon al danĝero; Blankineto, ĉiam pli grasa, ŝajnas prezenti sin al mi kiel plej bona nutraĵo, sed tio tute ne ĝojigas min, mi neniam karesis ŝin tiel multe kaj la fino al kiu mi estos baldaŭ devigita ŝajnas al mi ĉiutage pli dolora.

13an de Februaro.

Mi ree serĉadis en la tuta domo, mi fosis la teron en diversaj lokoj por trovi, se eble, ian kaŝitan provizaĵon, mi nur sukcesis per tiu forta movado eksciti ĉe mi malsaton. La penso, ke mi baldaŭ ne plu povos kontentigi ĝin, ŝajne igas ĝin ĉiun tagon pli postulema. Mi diris al mi: „Eble post ripozo dum kelka tempo la lakto de Blankineto revenos.“ La eksteraĵo verdire ne pravigis tiun supozon, la mamo tiel dika kaj plena antaŭ kelka tempo iom post iom malŝveliĝis; tamen mi ekprovis eltiri el ĝi kelkajn gutojn da lakto. Vana penado!

17an de Februaro.

La malvarmo fariĝis tiel akra de hieraŭ vespere, ke mi bezonas senĉesan fajron. Ĉe tia temperaturo mi tute ne timus meti, sen alia prizorgo, la viandon de mia kara kaprino en

la bovinejon, kie forte frostas, sed la vetero povus mildiĝi. Mi do devas decidiĝi senprokraste, nur restas al mi la necesa provizo da salo por mia ofico de buĉisto!

18an de Februaro.

La malvarmo estas tranĉa; ĝi revekas en mi la memoron pri la lupoj. Nenio nun malhelpas ilin trakuri la montaron. Dio mia, en mia nuna malĝoja situacio, estas la sola fino, kiun mi timas. Se hodiaŭ lavango povus engluti min, mi ricevus la morton kvazaŭ liberigon.

20an de Februaro.

Mi kaptis gravan decidon! Morgaŭ mi forlasos la domon. Antaŭ ol mi riskos mian vivon, mi volas skribi en mian taglibron, kiun mi lasos sur tiu ĉi tablo, kiel mi alvenis al tiu decido.

Hieraŭ matene la blekoj de Blankineto vekis min el terura sonĝo. Mi vidis min kun sangoplenaj manoj, senvjandigantan la tremantajn membrojn de tiu bedaŭrinda besto; la kapo kuŝis antaŭ mi kaj mi tamen aŭdis dolorajn blekojn elirantajn el ĝia gorĝo. Blankineto efektive blekis en tiu sama momento. Mi vekiĝis kun vangoj tute malsekaj de larmoj. Kia ĝojo revidi la karan beston ankoraŭ vivantan! Mi kuris al ŝi, ŝi estis pli karesema ol iam ajn.... Mia ĝojo ne daŭris longe; mi pripensis, ke miaj manĝaĵoj estos elĉerpitaj post du tagoj; mi devis decidiĝi. Mi prenis

tranĉilon, kaj komencis akrigi ĝin sur la fajrujo. Malespero premegis min. Ŝajnis al mi, ke mi fariĝas mortiganto, sed kiam mi alproksimiĝis ŝanceliĝante por mortfrapi Blankineton, mi haltis kaptita de konsciencaj riproĉoj.

La malvarmo glaciigis miajn manojn, estis motivo por prokrasti ankoraŭ la agon, kiu tiel timigis min; mi ekbruligis grandan fajron kaj enprofundiĝis en pensojn varmigante min.

Se la lupoj povas marŝi sur la neĝo, mi diris subite, kial ni ankaŭ ne povus marŝi sur ĝi?

Tiu ĉi ideo igis min ektremi pro ĝojo; poste timo min kaptis. Mi liverus min al tiuj malsataj bestegoj, kaj por ne oferi Blankineton, mi riskus oferi min mem al la lupoj!

Kaj se mi mortigos la kaprinon, diris mi poste, ĉu mi estas certa, ke la viando sufiĉos ĝis la tago de mia liberigo? Mi kelkafoje vidis la monton blankan ĝis la somero; mi ne perdu la okazon, kiu prezentas sin, dum la neĝo estas frostiĝinta! Atako de la lupoj dum mia irado tute ne estas certa, ĉar se mi foriras, mi iros rapide, mi veturos per glitveturilo!...

Ĉe tiu penso mi subite eksaltis. Mia decido estis kaptita kaj de tiu momento mi laboris por ĝia efektivigo.

Du tagoj sufiĉis por fabriki neperfektan sed jam taŭgan neĝveturilon por la vojaĝo. Mi dediĉis por tio la plej bonan lignon, kiu restis al mi. Mi donis al la malsupro de l' veturilo grandan larĝecon por eviti, ke ĝi enprofundiĝu

en la neĝon. Mi sidiĝos sur la antaŭa parto, mi alligos la kaprinon post mi kun ligitaj piedoj por ke ŝi tute ne povu moviĝi. Ĉar mi kutimis de mia infaneco gvidi, kiel ludo, glitveturiletojn sur krutaĵoj, mi esperas, se ne okazas akcidento, ke mi baldaŭ alvenos en la ebenaĵon.

Tamen mi iras en liton kun granda emocio. Mi rigardas kun korpremo tiun malliberejon, kie mi tiel suferis kaj kie mi lasos la tombon de mia avo. Kun teruro mi pensas pri la malproksimeco de la vilaĝo, sed mi ne ŝanĝos mian decidon. La ideo baldaŭ scii ion certan pri la sorto de mia patro donas al mi nekredeblan senpaciencon. La veturilo estas preta. Jen la ŝnuro per kiu mi kunligos la piedojn de Blankineto, jen la garbo, kiu utilos kiel lito kaj ŝirmilo, la kovrilo per kiu mi envolviĝos; jen fine, la „Imitado de Jesuo Kristo". Mi ne plu apartiĝos de ĝi, ĝi devas min sekvi tra la vivo ĝis la morto. Kun ĝi mi diras en tiuj ĉi lastaj momentoj:

„Sinjoro, mi alvenis al tiu ĉi horo, por ke Via gloro ekbrilu, ĉar kiam mi troviĝis en granda bezono Vi liberigis min! Plaĉu al Vi, Sinjoro, liberigi min! Kion mi povus fari, mizera kiel mi estas, kaj kien mi irus sen Vi? Helpu min, Dio, kaj mi nenion timos."

2an de Marto.

En la domo de mia patro.

Mi estas proksime de li. Li ĵus relegis mian taglibron, kiun mi ne bezonis lasi en la

montdomo, kaj li insistas por ke mi skribu la konkludon. La spirita konfuzeco en kiu mi estas ankoraŭ, post unu semajno da feliĉeco ne permesos al mi raporti kun multe da ordo pri la lasta sceno de mia kaptiteco. La cirkonstancoj estis tute aliaj ol mi pensis.

La 21an de Februaro, la malvarmo ŝajnis al mi ankoraŭ pli akra, mi do decidis ne perdi eĉ unu momenton. Mi devis fosi sufiĉan trairejon por la glitveturilo; sed mi povis ĵeti la neĝon en la domon kaj tio plifaciligis mian laboron; tuj mi entreprenis ĝin kaj laboris kun tiom da fervoro, ke mi fine laciĝis. Mi estis devigita halti momenton; mi ekbruligis fajron.

En la momento kiam la fumo supreniris, mi aŭdis grandan bruon ekstere; mia unua penso estis, ke la lupoj rimarkis min, kaj ke ili volas min engluti; rapide mi fermis la pordon. Mia teruro ne longe daŭris, baldaŭ mi aŭdis klare voĉon, kiu vokas min per mia nomo kaj mi eĉ kredis rekoni la voĉon. Mi respondis per ĉiuj miaj fortoj.

Krioj de ĝojo pruvis al mi, ke oni aŭdis min.

Tuj ĉe la flanko de l' pordo konfuza bruo de voĉoj aŭdiĝis, kvazaŭ de personoj kiuj ekscitiĝas ĉe laboro. Post kelkaj minutoj sufiĉe larĝa malfermaĵo finis mian komencitan laboron.

Mia patro apenaŭ atendis, ke la truo estu trairebla, li ensaltis en la domon elĵetante krion. Mi estis en liaj brakoj.

— Kaj via avo? demandis li.

Mia emocio estis tro granda por ke mi povu respondi. Mi kondukis lin en la laktejon. Li falis genue sur la tombon, mi faris same kaj ĉar mi klopodis rakonti al li detale tion, kio okazis, li vidis, ke tio superis miajn fortojn pro mia spirita stato.

— Pli malfrue, infano mia, diris li. Ni ne elmetu nin al nova danĝero. La tempo premas nin, la hejmreveno ne estos facila.

La viroj, kiuj akompanis lin estis enirintaj. Estis du el miaj onkloj, kaj Petro nia servisto. Ĉiuj kisis min. Ili vidis miajn preparaĵojn, kiujn oni aprobis kaj oni decidis foriri senprokraste. Miaj liberigantoj portis sub siaj piedoj lignajn tabuletojn kun malgrandaj ferpintoj. Ili estis kunprenintaj du parojn plie. Ho ve! unu paro estis senutila, mi surmetis la alian.

Petro estis komisiita direkti la glitveturilon. La lupojn ni ne timis, ni ĉiuj estis armitaj. Mia patro prenis min per la mano kaj metis sur mian ŝultron malpezan pafilon.

— Ne estas taŭga momento, li diris, por forporti la mortan restaĵon de mia patro. Ni revenos por ĝin preni tuj kiam la sezono ĝin permesos, por fari al ĝi decan enterigon en la vilaĝo.

— Vi divenas, mi diris, la volon de mia avo.

Tiam ni reeniris momenton en la laktejon, miaj onkloj estis venintaj kun ni. Post mallonga silento:

— Adiaŭ, ekkriis mia patro dolorplene. Mi faras tion, kion vi estus sendube ordoninta,

forigante de tie ĉi kiel eble plej baldaŭ, tiun infanon, kiu kaŭzis al vi tiom da turmentoj, kiel al ni. Adiaŭ mia patro!

Ni foriris kun larmoj en la okuloj. La malsupreniro estis rapida sed laciga. Mi estis blindigita de la lumo de l' suno kaj de la brileco de l' neĝo. La malvarmo estis forta, sed mi ne plendis pri ĝi, tio estis, kio min savis. Blankineto dankis la vivon al tiu malvarmega vento, kiu igis ŝin frosttremi sur la neĝveturilo.

Post longa irado sur la neĝo sen alia akcidento ol tiu, ke ni de tempo al tempo enprofundiĝis iom, ni alvenis al la loko, tre malproksima de l' vilaĝo, ĝis kie oni fosis vojon por klopodi savi nin. Mi estis mirigita de la giganta laboro, kiun ĝi postulis kaj mi komprenis, ke sen la frosto oni ne estus povinta liberigi min antaŭ longa tempo.

— Oni estus sukcesinta iri al vi, jam en la Decembra monato, se la malvarmo estus daŭrinta, diris mia patro, sed la neĝo moliĝis kaj oni devis forlasi la laboron. Eksciu, mia kara Ludoviko, ke niaj najbaroj ŝparis nek bonvolon nek fervoron, sed laŭ homa memoro, neniam falis tiom da neĝo. Kvar fojojn oni malfermis la vojon, kaj kvar fojojn ĝi estis refermita kiel antaŭe.

— Ĉu ĝi estis fermita tuj de la unua tago? mi demandis.

Tiam mia patro sciigis min pri tre malfeliĉa okazintaĵo; li preskaŭ pereis surŝutita

per disfalanta neĝo, kiam li malsupreniris de la monto; oni trovis lin kvazaŭ mortanta sur la rando de profundaĵo kaj tute proksime de tiu loko oni retrovis la bastonon de mia avo kaj mian botelon.

Oni forportis mian patron senkonscian, kaj li restis tri tagojn en tiu duonmorta stato. Oni perdis tiun tempon serĉante nin en la neĝo de l' profundaĵo. Kiam mia patro rekonsciiĝis, jam estis tro malfrue por provi savi nin; tia provo eĉ estus estinta ekstreme danĝera, se ne tute neebla jam la unuan tagon.

Mi ne parolos pri la turmentoj de mia patro nek pri liaj penadoj por veni al ni; oni ankoraŭ pli suferis en la vilaĝo ol ni sur la monto. Ĉiuj niaj najbaroj, kiuj kuris renkonte al mi, esprimis al mi siajn amajn sentojn, kaj mi hontis pro tio, ke mi dubis pri ilia sindoneco.

Ĉiu volas vidi Blankineton, oni faras al ŝi mil karesojn kaj gardas por ŝi la plej bonan fojnon, la plej molan pajlon; ĝi estos la plej dorlotita, la plej feiĉa el ĉiuj kaprinoj.

Dio savis mian vivon, kaj mi laŭdas lin; li ne permesis, ke mia avo revidu sian familion: tiu amiko, kiun mi priploras, instruis min neniam plendi kontraŭ la dekretoj de la Antaŭvideco.

Sed ĝi postulas de mi nur rezignacion, kaj ne ofendiĝas pro miaj bedaŭroj. Dio mia, se mi Vin amas, mi tion ŝuldas al mia kara avo; faru ke mi estu fidela al Vi kiel li estis, por ke mi iam retrovu lin en la ĉielo.

Berliner Spezial-Druckerei Anh. Alt-Moabit 105.

BIBLIOTEKA PODLASKA
134651

Nova Esperanto-Biblioteko

a) Pri la mondmilito

No. 1. **La kulpo de Entente.** Konciza resumo kunmetita el oficiala materialo.

No. 2. **La efikoj de la U-boata milito.** Laŭ oficialaj elmontroj el komenco de Aŭgusto 1917.

No. 3/4. [illegible] de la angl[illegible]r" de E. D[illegible]

([illegible]

No. 5. [illegible]minal-roma[illegible]

No. 6. [illegible]j. El germ[illegible] Dua, komp[illegible]

No. 7. [illegible]lumo: Intern[illegible]

No. 8. [illegible]ovelo. El ge[illegible].

Nr. 9. [illegible]n la Saĝul[illegible]. El germa[illegible]

Nr. 10. [illegible]Proz-versa[illegible]noff. (En pr[illegible]

[illegible]

Esperan[illegible]b.H.
Berlin kaj Dresden

Esp
134651

ESPERANT

No. 1. Legolibre
No. 2. Fabeloj
tradukitaj el dana lingvo de Fr. Skeel-Giörling.
No. 3. Bona Sinjorino, novelo de E. Orzeszko, tradukita el pola lingvo de Kabe.
No. 4. Rusaj Rakontoj, de Mamin Sibirjak, tradukitaj el rusa lingvo de N. Kabanov.
No. 5. Don Kihoto en Barcelono, tradukita el hispana lingvo de Fr. Pulujà y Vallès.
No. 6. El la Biblio, trad. Dro L. L. Zamenhof.
No. 7. El Dramoj (fragmentoj), tradukitaj el germana lingvo de Dro L. L. Zamenhof.
No. 8. El Komedioj (fragmentoj), esperantigitaj de Dro L. L. Zamenhof.
No. 9. Praktika Frazaro. Dialogoj de la ĉiutaga vivo, kunmetis J. Borel.
No. 10/11 (duobla numero). Japanaj Rakontoj. El Japana lingvo kunmetis Ĉif Toŝio.
No. 12. Reaperantoj. Familia dramo de Henrlk Ibsen (1 a aktoj), trad. el norvega lingvo de O. Bünemann.
No. 13. Bulgaraj Rakontoj, el bulgara lingvo tradukis At. D. Atanasov.
No. 14/15 (duobla numero)
la angla lingvo tradukis Ivy Kellermann, A. M., Ph. Dr.
No. 19. Sinjoro Herkules. Unuakta burleskaĵo de Georg Beltiy, el germana lingvo tradukis H. Arntz kaj M. Butin.
No. 20. La lasta Usonano de J. A. Mitchell, el la angla lingvo trad. Lehm. Wendell.
No. 21. Hungaroj Rakontoj de Ferenc Herczeg, el hungara lingvo trad. A. Panajott.
No. 22. Nord-germanaj Rakontoj de Heinrich Bandlow, el platgermana lingvo tradukis Ella Scheerpeltz.
No. 23. Hispana Dramoj de Jacinto Benavente, tradukis Vicente Inglada.
No. 24. La Instituto Milner de Jean Jullien. Trad. el franca Lingvo la Lyon-a grupo.
No. 25. Noveletoj el la Nigra Arbaro de Hel. Christaller. Trad. el germana lingvo Wilh. Christaller.
No. 26. La intervidiĝo kaj Nekonita Dialogo de Alfred de Vigny, el franca lingvo trad. Sam. Meyer.
No. 27. La Patrino de E. Zahn. El la Germana trad. J. Smid.
No. 28. Legendoj. El
radukis Char-
numero). Sub
libro de juna
Jura-montaro
El la Franca
Pre
ota. Kelkaj numeroj
Ĉiu libreto enhavas 40—50 paĝojn

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel GmbH., Berlin kaj Dresden

134651

Berliner Spezial-Druckerei G.m.b.H., Berlin NW 21, Alt-Moabit 105.